Germana Esperantisto

Der Deutsche Esperantist

Aperas duonmonate en du alternantaj eldonoj: Eldono A (Propagando), Eldono B (Literaturo). — Abonprezo por jaro: por Germanujo 2,— Sm, (por eksterlando 2,250 Sm). Unu eldono aparte: 1,— Sm (1,125 Sm). — Provabonoj por kalendara kvaronjaro 0,250 Sm (0,300 Sm) por unu eldono.



Erscheint halbmonatlich in zwei abwechselnden Ausgaben Ausgabe A (Propaganda), Ausgabe B (Literatur). — Bezugspreis für ein Jahr: für Deutschland 4,— M., (für das Ausland 4,50 M.). Jede Ausgabe einzeln: 2,— M. (2,25 M.). — Probeabonnements für ein Kalenderquartal 0,50 M. (0,60 M.) für jede Ausgabe.

Anoncoj: Vidu tarifon sur la kovrilo. — Anzeigen: Siehe Tarif auf dem Umschlag.

Alsenditajn artikolojn la redakcio laŭ bezono korektas. Nepresitajn manuskriptojn ni redonas nur, se oni aldonis poŝtmarkon por la resendo

9a Jaro No. 7/8 A || Redakcio kaj Eldonejo: Berlin SW. 68, Lindenstr. 18/19 || Julio Aŭgusto 1912

Enhavo:

Avizo!

Tiu ĉi kajero estas duobla numero, ĉar pro la germana kaj internacia kongresoj nia ĵurnalo en Aŭgusto ne aperas. La proksima numero de eldono A eliros la 5an de Septembro.

Germana Esperantisto.

Zur Beachtung!

Dieses Heft ist eine Doppelnummer, weil wegen des deutschen und internationalen Kongresses unser Blatt im August nicht erscheint. Die nächste Nummer der Ausgabe A wird am 5. September hinausgehen.

Germana Esperantisto.

Esperantisten Deutschlands!

Auf nach Danzig-Zoppot und Krakau!

In dieser Nummer bringen wir die letzten Mitteilungen über die beiden bevorstehenden Kongresse, die von ihren Ausschüssen aufs sorgfältigste und beste vorbereitet sein werden. Sache der Esperantisten ist es nun, dafür zu sorgen, dass die von den Ausschüssen geleistete Riesenarbeit nicht vergeblich getan ist. Und das wird nicht der Fall sein, wenn beide Kongresse so zahlreich besucht werden, dass sie, jeder in seiner Art, zu machtvollen Kundgebungen für unsere grosse Sache werden.

Deutsche Gesinnungsfreunde! Wer es von euch in bezug auf Zeit und Geldmittel irgendwie ermöglichen kann, sollte sich keinen Augenblick besinnen, gerade im Jubiläumsjahre an diesen beiden Kongressen teilzunehmen, deren zeitliches Aufeinanderfolgen ihren Besuch ungemein erleichtert.

Jeder der beiden Kongresse hat sein besonderes Gepräge. In Danzig-Zoppot werden wichtige Punkte über verschiedene Angelegenheiten unseres Deutschen Esperanto-Bundes zur Verhandlung kommen, während in Krakau die Schaffung der so notwendigen internationalen Propaganda-Organisation im Mittelpunkt des Interesses stehen wird. Beide Kongressorte bieten auch landschaftliche Schönheiten, die allein schon einen Besuch rechtfertigen: im herrlich gelegenen Zoppot grüsst uns das Baltische Meer, und in Krakau reizt uns die romantische, wildzerklüftete Hohe Tatra zu schönen Ausflügen.

Darum auf nach Danzig-Zoppot und Krakau! Man lasse sich nicht betören von solchen Nörglern, die behaupten, dass ein nationaler Esperanto-Kongress eine langweilige Sache sei. Jeder unserer bisherigen deutschen Kongresse hat eine Fülle interessanter Darbietungen gebracht, und auch in Danzig-Zoppot wird dafür gesorgt, dass die Kongressteilnehmer nicht enttäuscht wieder von dannen ziehen. — Man höre aber auch nicht auf jene Chauvinisten, die von dem Besuch des Krakauer Kongresses aus politischen Gründen abraten. Unsere internationalen Kongresse sind ein neutrales Feld, das auch in Krakau seinen Charakter bewahren wird. Grundlos ist auch die Furcht vor dem „schmutzigen Nest“. Mit Ausnahme einzelner Stadtteile, wie sie aber fast in

jeder grossen Stadt zu finden sind, ist Krakau ebenso sauber wie andere Städte.

Wir hoffen nun, dass beide Kongresse den an sie gestellten Erwartungen entsprechen werden, und wir wünschen beiden, sowohl in bezug auf die geschäftlichen Verhandlungen als auch in bezug auf den allgemeinen Verlauf, die besten Erfolge!

In den im September erscheinenden Nummern A und B werden wir ausführlich über die Kongresse berichten.

Germana Esperantisto.

Ankoraŭ pri organizo internacia.

Dum la pasinta monato la organiza demando fariĝis pli kaj pli „brula"; preskaŭ ĉiuj gravaj Esperantaj gazetoj pritraktis la temon laŭ siaj vidpunktoj. Rimarkinde estas, ke la kontraŭuloj de poresperanta asocio laŭŝajne jam forpafis sian pulvon, kaj ke nun la amikoj de tia organizaĵo praviĝas sian opinion per tute trafaj argumentoj.

Por doni al niaj legantoj resumon pri la nuna stato de la demando, ni ĉi-sube aŭ plene publikigas aŭ priparolas kelkajn el la plej gravaj artikoloj, aperintaj dum la lasta tempo.

Plej grava estas la letero de nia Majstro, kiun li publikigis en „*Pola Esperantisto*" (Junio). Kun mirinda klareco li esprimas sian opinion pri la organiza demando, eĉ ne ŝanceliĝante, energie refuti malpravajn kaj malĝustajn eldirojn de kontraŭuloj. Bedaŭrinde nur estas, ke la Majstro deklaris, ke li ne plu volas skribi pri organizaj demandoj. Sed oni povas kompreni ĉi tiun decidon, se oni konsideras la malnoblan manieron, per kiu kelkaj el la kontraŭuloj pritraktas la demandon kaj ne respektas la proponojn de Dro Zamenhof, akceptitajn en Antwerpen. Ni ne forgesu, ke li estas la plej kompetenta persono en Esperantujo, kies opiniojn kaj proponojn oni neniam devas lasi nekonsiderataj.

Jen la plena teksto de la citita artikolo:

Letero de nia Majstro
pri Rajtigitaj Delegitoj kaj pri la Centra Organizo.

Kara Sinjoro Redaktoro! Laŭ la propono de la „Espero Katolika" Vi petis min, ke mi per Via estimata gazeto esprimu mian opinion pri tiu demando, kiu en la lasta tempo vekis tiom multe da disputoj kaj malpaco inter la esperantistoj (demando pri organizo). Mi konfesas, ke mi ne tute klare komprenas, por kio povas utili la petita publikigo de mia opinio. Ĉiu, kiun mia opinio interesas, povas ja scii ĝin tre bone, ĉar en la antaŭparolo al mia projekto pri Rajtigitaj Delegitoj kaj parte ankoraŭ en mia publika parolo Antverpena mi esprimis mian opinion tute klare kaj precize.

En ia stranga, por mi ne komprenebla maniero ekkuris bedaŭrinde la famo, ke la projekto pri Rajtigitaj Delegitoj estas ne mia opinio, sed opinio fremda, kiun oni altrudis al mi! Kaj tio sufiĉis, por ke multaj esperantistoj, anstataŭ memstare pripensi mian projekton, tuj en la komenco akceptis ĝin kun malkonfido. En Antverpeno tiu malkonfido malaperis, sed poste, sub influo de agitado, ĝi denove aperis. Bone, en tia okazo por kio do servos mia nun ripetota klarigo? oni ja simple diros denove, ke la nunan artikolon iu devigis min publikigi . . .

En Antverpeno mi laŭte kaj tre klare demandis la esperantistojn, ĉu ili deziras, ke en niaj kongresoj ni de nun havu Rajtigitajn Delegitojn. Pri tiu demando, kiu ne estis ja starigita surprize, sed pri kiu ĉiuj havis antaŭe sufiĉe da tempo, por ĝin pripensi kaj priparoli, la grandega plimulto respondis per „jes". Se la demando estus pri tio, ĉu la esperantistoj konfidas al mi la kondukadon de la tuta Esperanta afero, oni povus eble pensi, ke ili sin ĝenas fari al mi malagrablaĵon; sed ĉar la demando absolute neniom koncernis mian personon, tial neniu havis kaŭzon, por sin ĝeni.

La voĉoj kun „jes" prezentis tian frakase grandegan plimulton, kaj ĉe la tuj farita kontraŭpruvo la voĉoj kun „ne" prezentis tian bagatelan nombron, ke pri la volo de la kongresanoj povis ekzisti absolute nenia dubo. Ŝajnis do, ke ni havas plenan kaj absolute nedisputeblan rajton esperi, ke de nun ĉio estos en plej bona ordo, ke finiĝos la konstanta malpaco, kiu regis en nia tendaro dum la lastaj jaroj, ke de nun ĉiu dubo, koncernanta la tutan esperantistaron, estos solvata ne de apartaj demagogoj, kiuj altrudas al ĉiuj sian opinion aŭ deziron, sed de la esperantistaro mem, per iliaj ĉiujare kaj orde elektotaj delegitoj.

Sed ho ve, la espero nin trompis. Tuj post la Antverpena kongreso komenciĝis denove agitado kontraŭ la institucio de Rajtigitaj Delegitoj. La malkontentuloj kredigas, ke la decido Antverpena estis altrudita al la esperantistoj, ke oni ne sciis, pri kio oni voĉdonis, ktp. ktp. Kontraŭ tiaj asertoj mi energie protestas kaj mi alvokas la ateston de ĉiuj, kiuj partoprenis en la kongreso.

Sinjoroj malkontentuloj! Se vi trovas, ke la Antverpena decido ne prezentas la volon de la esperantistaro, tiam pruvu tion kaj donu al ni la eblon informiĝi pli ĝuste pri tiu volo; se vi volas diri, ke la esenco de la projekto pri Delegitoj estas akceptita kaj oni nur neregule voĉdonis pri ia detalo, tiam diru tion klare kaj ne senkreditigu en la okuloj de la esperantistaro la tutan aferon; se nia voĉdonado estis neregula, aranĝu al ni alian, pli regulan voĉdonadon; miaflanke mi promesas al vi, ke ĉion, kion ajn la esperantistaro decidos, mi jam antaŭe blinde akceptas; sed mi deziras nur, ke tio estu la volo de la esperantistaro kaj ne la volo de apartaj personoj. Se montriĝos, ke la esperantistoj ne volas mem esti la administrantoj de sia afero, mi certe tion ne altrudos al ili; se en Antverpeno ni faris ian eraron, ĉu principe, ĉu en detaloj, donu al ni bonajn, trankvilajn konsilojn kaj helpu al ni rebonigi tiun eraron; sed se vi ne konsilas, sed nur atakas, senkreditigas kaj senkuraĝigas, — vi per tio certe ne faras bonan servon al Esperanto.

Kelkaj diras, ke oni atakas nun ne la principon de kongresaj Rajtigitaj Delegitoj, sed nur la konstantan „Generalan Organizon". Sed tio estas ja nur vortoj erarigaj. Oni scias, ke konstanta ĝenerala organizo

ne sole ankoraŭ tute ne ekzistas, sed ĝi eĉ ne estas ankoraŭ proponita. En Antverpeno oni nur elektis komitaton, kiu devas esplori la demandon pri tia organizo kaj eventuale ellabori kaj prezenti al la esperantistoj ian projekton. Kontraŭ kiu do kaj kontraŭ kio batalas la malkontentuloj, kiuj priskribis la elekton de la studa komitato kiel ion tute senordan, kontraŭregulan kaj eĉ preskaŭ kiel ian friponaĵon? Ni ne scias ankoraŭ, kiam la komitato finos sian studan laboron (en la nuna jaro — verŝajne sub la senkuraĝiga influo de la konstanta atakado — ĝi ne finis al la difinita templimo, kaj tial en Krakovo la rezulto de ĝia laboro ne povos esti prezentata al voĉdonado); ni ne scias ankoraŭ, al kia konkludo la komitato venos, t. e. ĉu ĝi trovos konstantan ĝeneralan organizon rekomendinda aŭ ne; se ĝi en la jaro 1913 prezentos projekton de organizo, ĝi laŭ la regularo publikigos la projekton almenaŭ tri monatojn antaŭ la kongreso, por ke ĉiuj esperantistoj havu sufiĉe da tempo, por ĝin pripensi kaj priparoli; poste ĝi estos diskutata de bone preparitaj Delegitoj en la kongreso, kaj nur poste ĝi estos regule voĉdonata . . . Kian do sencon havas la atakado kontraŭ projekto, pri kiu oni ne scias ankoraŭ, ĉu ĝi estos kaj kia ĝi estos?

Ĉu niaj malkontentuloj, kiuj la malbonecon de la Antverpena kongreso penis pruvi interalie per elmeto de la protesto de S-ro Michaux, efektive kaj sincere kredas, ke la Antverpena kongreso, kiu tute ne estis preparita nek rajtigita por la esploro de tia grava afero, devis tuj, senstude, akcepti la projekton de S-ro Michaux, anstataŭ transdoni ĝin al studa komitato? Ĉu ili mem ne estus la unuaj, kiuj terure protestus kaj insultus, se la kongreso farus ion similan? Ĉu niaj malkontentuloj efektive kaj sincere kredas, ke la tute ne preparita kaj ne rajtigita kongreso devis rapidece esplori kaj akcepti la projekton de U. E. A., kiu aperis nur dum la kongreso mem kaj kiun la esperantistaro tute ne havis la eblon antaŭe pripensi? Ĉu efektive kaj sincere la malkontentuloj vidas krimon en tio, ke, anstataŭ akcepti nepreparite kaj nerajtigite la projekton de S-ro Michaux aŭ de U. E. A., la kongreso decidis, ke antaŭe ĉio devas esti studata?

Ne sole ia definitiva ĝenerala organizo, sed eĉ ia propono pri tia organizo ne estas ankoraŭ akceptita; ĉio estas nun ankoraŭ studata. Neniu sekve povas dubi pri tio, ke la tuta atakado celas ne la ankoraŭ ne ekzistantan Ĝeneralan Organizon, sed nur la principon de kongresaj Rajtigitaj Delegitoj; la malkontentuloj simple ne volas, ke la esperantistoj havu la eblon decidi pri siaj komunaj aferoj. Kion do ili havas kontraŭ la principo de Rajtigitaj Delegitoj?

Ili timigas la esperantistojn, ke la Rajtigitaj Delegitoj forrabos de la esperantistoj ilian liberecon!! ke ili prezentos estraron, kiu donos al la esperantistoj ordonojn, metos sur ilin ŝarĝojn! Pardonu min, sinjoroj, sed tia timigado estas ja tre stranga. Ĉiu komprenas ja tre bone, ke la esperantistoj ne prezentas ian regnon kun ĝendarmoj kaj neniu havas aŭ iam povos havi la forton, devigi la esperantistojn ion fari aŭ ion oferi. Por la personoj, kiuj povus ankoraŭ havi ian dubon, estas ja tute klare dirite ne sole en la antaŭparolo al la regularo pri Delegitoj, sed ankaŭ en la regularo mem, ke por privataj esperantistoj la decidoj de la Delegitoj havas absolute nenian devigon, sed ili elmontras nur la opinion de la plimulto por tiuj esperantistoj, kiuj deziras scii tiun opinion kaj kiuj propravole deziras alkonformiĝi siajn agojn al tiu opinio. Kiu ne deziras tion fari, tiun certe neniu devigos. Ĉiu senpartia homo komprenas, ke la ĉefa celo de la Rajtigitaj Delegitoj estas: doni al esperantistoj plenan liberecon kaj forton. Nun, nia afero dependas de kelkaj plej popularaj gazetoj, kiuj sugestias al la tuta esperantistaro siajn opiniojn, kaj tio (kiel montris ekzemple la historio de nia movado en Svedujo) en ia neantaŭvidebla okazo povus iam fariĝi tre danĝera por nia tuta afero. La institucio de Rajtigitaj Delegitoj, kiu donas al ni la eblon ĉiam informiĝi pri la opinio de la plimulto, celas liberigi la esperantistaron de tiu dependo kaj nian tutan aferon de tiu danĝero.

Oni timigas la esperantistojn, ke la kongresaj Delegitoj eble iam ŝanĝos la lingvon! Sed en la regularo de niaj kongresoj ekzistas ja fundamenta paragrafo, kiu tre klare malpermesas al la kongreso pridiskuti demandojn lingvajn. Cetere — se eĉ tiu paragrafo ne ekzistus, ĉu efektive iu povas serioze pensi, ke la tuta esperantistaro iam fariĝos tiel idiota, ke demandojn pri lingvo aŭ aliajn demandojn, postulantajn specialan kompetentecon, ĝi pridiskutos en kongreso, konsistanta el nekompetentaj kaj ne speciale preparitaj personoj? Ĉiu komprenas tre bone, ke se aperos ia lingva demando, ĝi estos forsendata al la Akademio, poste — se la Akademio aprobos — al la tuta Lingva Komitato, kaj nur fine — se ankaŭ la tuta Lingva Komitato aprobos — ĝi venos al la kongreso, tamen kompreneble ne por lingva diskutado, sed nur por aprobo aŭ malaprobo. La kongreso sekve ne sole neniam povas decidi ian reformon kontraŭ la deziro de la Lingva Komitato, sed kontraŭe, ĝi povas doni sian malpermeson, se la Lingva Komitato farus ian facilaniman decidon. Sekve se ni tute prave ne timas, ke la Lingva Komitato iam faros facilaniman paŝon (kion ĝi sen kontrolo de kongresaj delegitoj povus ja fari multe pli facile, ol kun ilia kontrolo), — de la flanko de la Delegitoj certe minacas al ni nenia danĝero en ĉi tiu rilato, sed kontraŭe, la Delegitoj prezentos por ni defendon en la okazo, se eble la Lingva Komitato iam volus fari ian danĝeran agon. Neniu povas nun dubi, ke ĉia provo, fari en nia lingvo rompojn, renkontus plej energian kontraŭstaron de la tuta esperantistaro, ĉar en la nuna tempo ni ĉiuj konscias, ke tio estus pereiga por nia afero; sed la mondo devas scii, ke ni gardas la netuŝeblecon de nia lingvo nur pro prudento kaj kiel homoj liberaj, kaj ke se iam efektive aperus ia senduba neceseco ŝanĝi nian lingvon, ni principe havas la rajton tion fari tiel same, kiel ĉiu nacio principe havas la rajton fari kun sia nacia lingvo ĉion, kion ĝi trovos necesa. Ĉiu penado gardi la netuŝeblecon de nia lingvo per rimedoj de iaj Aziaj regnoj, t. e. per malpermeso de kunvenado kaj konsiliĝado pri niaj aferoj pro la timo, ke eble ni volos iam konsiliĝi pri la lingvo mem, — tia penado ludi la rolon de ĝendarmoj sen forto estus ne sole ridinda kaj tute sensukcesa, sed ĝi donus rezulton rekte malan: ĝi nur instigus deziron de reformoj kaj senkreditigus nian lingvon en niaj okuloj kaj en la okuloj de la tuta mondo multe pli, ol tion povus fari ĉiuj kontraŭesperantistoj kune prenitaj.

Oni eble timas, ke la Delegitoj povos iam fari alian (ne lingvan) facilaniman decidon? Sed ĉiu diskutota demando estos ja publikigita tri monatojn

antaŭ la kongreso, ĉiuj esperantistoj sekve havos sufiĉe da tempo, por pripensi ĝin kaj averti siajn delegitojn; kaj se malgraŭ ĉio la Delegitoj faros iun facilaniman decidon, la malkontentuloj povos ja dum tuta jaro priparoli la decidon, prepari la spiritojn kaj prezenti al la venonta kongreso proponon pri forigo de la antaŭa decido.

Oni plendas kontraŭ diversaj detaloj de la regularo pri Rajtigitaj Delegitoj; ekzemple oni protestas kontraŭ la decido, ke la societoj, sendantaj Delegitojn, devas ion pagi por tio; aŭ oni plendas kontraŭ tio, ke la kondukado de la aferoj pri la Delegitoj estas transdonita al la Centra Oficejo, kiu laŭ la diro de la malkontentuloj malbone kondukas la aferon kaj malbone uzos la enkasigitan monon. Bone; sed se la malkontentuloj estas konvinkitaj, ke ili estas pravaj, kiu do malpermesas al ili, ke al la venonta kongreso ili lojale kaj trankvile prezentu proponon pri la forigo aŭ ŝanĝo de la al ili malplaĉantaj detaloj?

Oni diras, ke proponon, kiu estas malagrabla al la prezidanto de la Konstanta Kongresa Komitato, ĉi tiu prezidanto ne volos enporti en la tagordon de la kongreso, kaj sekve oni ne povos ĝin pridiskuti. Sed ĉiu povas ja facile kompreni, ke tia timo estas tute senkaŭza, ĉar la prezidanto de la Konstanta Kongresa Komitato ne havas ja la rajton nek la povon malakcepti ion en la tagordon laŭ sia propra plaĉo. En Antverpeno la tuta kongresa komitato (ne la prezidanto) rifuzis akcepti unu proponon nur pro tio, ke ĝi celis elvoki skandalon. Sed se iu en ĝentila maniero skribos ekzemple: „mi proponas, ke la rajto sendi Delegitojn estu senpaga“, aŭ: „mi proponas, ke por plena senpartieco kaj superpartieco de la institucio de Rajtigitaj Delegitoj, ĉiuj aferoj, koncernantaj tiujn Delegitojn kaj ĉiuj pagoj de tiuj Delegitoj estu administrataj ne de la Centra Oficejo, sed de iu speciala sekretario-kasisto, elektita de la Delegitoj mem“, — ĉu efektive iu povas timi, ke tiamaniere redaktitajn proponojn la kongresa komitato povus propravole malakcepti en la tagordon? Kaj se eĉ ni supozus, ke la kongresa komitato farus tian maljustaĵon, la proponanto havas ja ĉiam la rajton apelacii al la Delegitoj private kaj senpere, kolekti por sia propono la necesan nombron da subskriboj kaj devigi la komitaton enporti la maljuste rifuzitan proponon en la tagordon.

Oni eble diros, ke pro ia premado de la flanko de la „eminentuloj“, nenia propono malagrabla por la eminentuloj povas havi esperon ricevi por si en la kongreso plimulton da voĉoj. Sed ankaŭ tio estas ja tute ne vera; ĉar dum longa tempo antaŭ la kongreso ĉiu proponanto havas ja plenan povon bone motivi sian farotan proponon en la gazetoj aŭ per cirkuleraj leteroj al la societoj kaj grupoj esperantistaj kaj sekve garantii al si, ke, se lia propono estas efektive prava, ĝi certe trovos por si en la kongreso la plimulton da voĉoj.

Vi vidas sekve, ke ĉion, kio povas esti utila por nia afero, oni povas tre bone atingi en maniero trankvila, kaj tute ne estas necese semi konstantan malpacon kaj per ĉiuj fortoj paralizi ĉian vivon kaj progreson en nia afero. La Delegitaro konsistas el homoj kaj kompreneble povas erari; precipe facile ĝi povis erari en la unua momento post sia naskiĝo, kiam ĝi havis ankoraŭ tro malmulte da sperto. Tion ĉiu devas kompreni, kaj ĉiu bona esperantisto, al kiu ŝajnas, ke la Delegitaro eraris, devas lojale diri al si: „la plimulto decidis, sekve mi devas min submeti; sed ĉar mi estas konvinkita, ke la decido estas erara, tial mi penos, ke en la venonta kongreso oni rebonigu la eraron“. Sed se iu, al kiu ne plaĉas tiu aŭ alia decido, tiu aŭ alia eble nelerta faro de la kongresa estraro, tuj malpaciĝas, komencas atakadon, bojkotadon, senkreditigadon de la tuta kongreso ktp. . . . ĉu tia agado estas bona?

* * *

Ĉi tiu mia artikolo estos verŝajne mia lasta artikolo sur la kampo de esperantista diskutado. Pro kelkaj kaŭzoj mi de nun verŝajne neniam plu partoprenos en diskutado, nek en la kongresoj, nek en la gazetoj. En Krakovo mi tute certe detenos min de ĉia partoprenado en la diskutoj; sekve tiuj, kiuj estas kontraŭ mia opinio, havas plenan povon kontraŭbatali ĝin per ĉiuj fortoj, ne timante, ke mi polemikos kontraŭ ili eĉ per unu vorto. Sed ĝuste pro tio, ke mi ne intencas plu diskuti, mi nun la lastan fojon klarigis mian opinion.

Mi atentigas pri tio, ke mi esprimis ne mian deziron, sed nur mian opinion, ĉar mia deziro estas nur unu: ke la Esperanta afero vivu kaj progresu sane, en kia ajn maniero tio estos. Se mia opinio estas erara, la esperantistoj forĵetu ĝin; sed ili faru tion en maniero orda, per regula voĉdonado.

L. L. Zamenhof.

* * *

Tre atentinda estas la sekvanta artikolo, kiun sendis al ni S-ro von Frenckell. La verkinto pritraktas la aferon laŭ alia vidpunkto, kaj lia propono ŝajnas al ni bona kompromiso, sur kies bazo la fondo de poresperanta asocio estas atingebla eĉ kun konsento de la peresperantanoj.

Propono pri fondo de poresperanta „Internacia Esperanto-Asocio“.

Leteroj flugas amase inter la agemaj esperantistoj aŭ por aŭ kontraŭ organizado de la esperantistaro; en preskaŭ ĉiu Esperanta gazeto aperas artikoloj aŭ por aŭ kontraŭ la plenumo de la Antwerpen'aj decidoj. Precipe citindaj estas la esprimitaj opinioj en „*Pola Esperantisto*“ (letero de l' Majstro), la pororganizaj artikoloj en „*Germana Esperantisto*“, „*Holanda Pioniro*“, „*Pola Esperantisto*“, „*La Ondo de Esperanto*“. Ne malpli citindaj estas la kontraŭartikoloj en „*Esperanto*“, „*Lingvo Internacia*“, „*Le Monde Espérantiste*“, „*Danubo*“ k. a. „*The British Esperantist*“ konstatas la faktojn, kaj „*Oficiala Gazeto*“ la decidojn alprenitajn.

Estas vera ĝojo konstati, kun kia fervoro la diversaj opinioj estas apogataj, sed mi bedaŭras, ke kelkaj kritikantoj akre kaj ne amike kontraŭbatalas ĉiun aliopinianton. Kun iom da miro mi ankaŭ konstatas, ke „*Esperanto*“ (Ĝenevo) ne pritraktas la samajn ideojn, kiujn ĝia direktoro esprimas en sia propono „Kiel nin organizi“. Tiu ĉi broŝuro donis certan bazon por organizado laŭ vidpunkto de U. E. A.

Bedaŭrinda estas la fakto, ke la subkomisio, elektita en Antwerpen, ne povis pretigi sian raporton ĝustatempe. La kaŭzoj estis multaj malhelpoj; malfrue alsenditaj proponoj, privataj kaŭzoj kaj la intertempe ŝanĝita stato de la demando devigis la sekretarion

de la komisio, de semajno al semajno prokrasti la raporton, kaj mi, kiel ano de la studkomisio, persone liberigas min de la respondeco pri tiu ĉi fakto, kiun mi ne povis malhelpi.

Tiu raporto sendube estus montronta diskuteblan bazon por la demando „Ĉu esti aŭ ne esti".

Du gravaj faktoj estas la rezultato de la malfruigo. Unue: la esperantistaro nun havos pluan jaron por pripensi kaj studi, ĉu ĝenerala organizo estas dezirinda; due: U. E. A. intertempe certe estos devigata decidi, ĉu ĝi volas sekvi la proponojn de S-ro Hodler, aŭ "esti asocio aŭ voĉdonrajta korporacio de individuoj.

El tio rezultas, ke aŭ U. E. A. akceptos voĉdonrajton de korporacioj, aŭ kunagos en poresperanta organizaĵo de unuiĝintaj korporacioj, aŭ restos ekstere de tia organizaĵo. Ĉar fine ni ĝin ricevos, la ĝeneralan organizaĵon esperantistan.

La postulo al ĝi estas tro granda, la ĥaoso en la esperantistaro nun tro danĝera, la kongresoj de la esperantistaro nuntempe tro senvaloraj rilate al la praktika kaj laŭcela laboro, kaj la spertoj el la historio de la landoj, ŝtatoj kaj aliaj movadoj tro klaraj, tro trudaj al ni, tiel ke ankaŭ la esperantistaro komprenos, ke nia tasko nuntempe estas la propagando de Esperanto. Tial ĝi decidos la fondon de poresperanta asocio, kiu diskutos kaj decidos pri niaj komunaj deziroj kaj kontrolos nian movadon.

Mi opinias, ke la esperantistaro estas sufiĉe demokrata por kompreni, ke la individuo proponas, ke la aro diskutas kaj decidas pri bonaj kaj malbonaj proponoj, kaj ke la elektita estraro aŭ oficistaro plenumas la komunajn dezirojn.

Mi ankaŭ opinias, ke ĝi komprenos, ke por la funkciado rajtigitaro estas tiel bezona kiel la kongresoj, kaj ke kotizoj aŭ donacoj por ĝi estas necesegaj.

Fine mi opinias, ke oni komprenos, ke unuigitaj fortoj estas pli grandaj ol la fortoj de individuoj.

El tio rezultas kotizo, elektado, voĉdonrajto (aŭ dumjara aŭ dumkongresa) kaj oficistaro.

La du ĉefaj demandoj do estas la pridiskutado kaj decido rilate al la starigo de tiu asocio de la esperantistaj asocioj, societoj aŭ individuoj kun ĉiuj detaloj de regularo kaj limoj de rajto.

La dua demando estas: ĉu ekfondo de la asocio por ĉiuj per kongresa decido, aŭ ĉu fondo de ĝi private, kiel U. E. A. fondiĝis.

Per tiu ĉi demando mi tuŝas la nunan staton de la organiza demando.

Kelkaj, la plej fervoraj el nia anaro deziras konstati per unu bato, ke tiu tutmonda asocio jam ekzistas. Kontraŭ tiu decido batalas la plej agemaj kontraŭuloj. Ĉu prave ĉu neprave, pri tio mi ne volas ĉi tie decidi.

Certe estas, ke ili estas pravaj, se ili ne volas akcepti iun asocion aŭ estraron, al kies agoj aŭ taskoj ili ne fidas, aŭ kiujn ili ne komprenas.

Plie ŝajnas certe al mi, ke la tasko, reprezenti la esperantistaron, unuigi la naciajn societojn, amike interrilati kun aliaj asocioj, apogi la jam ekzistantajn komitatojn ktp., nuntempe ne estas plenumebla per unu bato. Ĉar multaj ne ĝuste komprenas la reprezentadon, kelkaj el la naciaj societoj mem ne estas sufiĉe organizitaj, la rilatoj inter la asocioj estas kelkafoje malamikaj, kelkaj el la komitatoj ne funkcias tiel, kiel ni tion deziras, kaj laste, ĉar niaj kasoj ĝenerale montras deficiton anstataŭ la kapitalon necesan.

El ĉi tiuj faktoj rezultas nia nuna tasko.

Oni ne altrudu al la esperantistaro ion, pri kio ne ĉiuj konsentas; oni permesu al la personoj aŭ asocioj, kiuj ne deziras ĝeneralan organizadon, resti ekstere, sed oni same permesu al la personoj aŭ asocioj, kiuj ĝin deziras, fondi ĝin private.

Ni ĝin fondu, kiuj fidas al ĝia valoro, kaj ni montru ne nur per vortoj, kion ni deziras, sed per agoj, kion ni povas kaj kion ni volas.

Se la asocio de korporacioj kiel privata esperantista entrepreno saĝe kaj prudente kondukos antaŭen Esperanton, ĝi plenumos sian taskon, ĝi varbos per la sukceso, sed ĉiam nur per ĝi, pli kaj pli vastajn rondojn, kaj fine ni havos la deziritan ĝeneralan organizon esperantistan por la bono de Esperanto kaj kiel plej certan bazon por ĝia praktika uzado, kiel U. E. A. ĝin deziras. Ju pli frue ĝi kunfandiĝos kun U. E. A., des pli bone.

Ni esperantistoj estas propravole esperantistoj, kaj ĉiu el ni estas libera, tial ni libere agu, libere decidu kaj libere apogu nian movadon aŭ per la kunlaboro mem aŭ per nia kotizo, por ke aliaj esperantistoj povu plenumi kun ni niajn altajn dezirojn. Ni ne ataku unu la alian pro alia opinio; liberaj homoj plenumu la propran decidon kaj submetu ĝin al la decido de la plimulto.

Esperanto prezentas al ni multajn laborkampojn, la esperantistaro konsistas el multaj gentoj kaj diversopiniuloj. Sur iu kampo ĉiu persono trovos kontentiĝon.

K. v. Frenckell,
Prezidanto de la Societo Esperanto Dresden.

P. S. Post pretigo de mia artikolo mi ricevis la broŝuron *„La Internacia Organizo de la Esperantomovado"* de D-ro Smulders. Tiu ĉi verketo estas efektive la plej bona, plej logika kaj plej klara, kiu ĝis nun aperis pri nia movado. Mi sincere rekomendas al ĉiu esperantisto, ĝin atente trastudi; ĝi donos kontentiĝon al ĉiu.

* * *

S-ro C. Bourlet afable disponigis al ni la presprovaĵojn de la julia numero de *„La Revuo"* (Babilado), en kiu li klare montras la gravajn erarojn, kiuj troviĝas precipe en la artikoloj de S-ro Hodler. Jen la plej interesa parto el la

Babilado.

En Antverpeno la rajtigitaj delegitoj tre serioze esploris, en tri kunsidoj, la demandon al ili proponitan. Cetere neniu dubas pri la reguleco de la laboroj kaj voĉdonoj en tiuj kunsidoj, alterne prezidataj de viroj, al kiuj ni ĉiuj konfidas, nome S-ro Bolingbroke Mudie, prezidanto de U. E. A. kaj nun ankaŭ prezidanto de la Brita Asocio, Dro Mybs, prezidanto de la Germana Asocio, kaj Sro Rollet de l'Isle, prezidanto de la Franca Societo por propagando de Esperanto.

Unue, preskaŭ unuanime, la delegitoj decidis, ke estonte en la kongresoj nur rajtigitaj delegitoj de propagandaj societoj havos rajton voĉdoni.

Poste ili zorge ekzamenis, diskutis kaj voĉdonis, artikolon post artikolo, la projekton de Dro Zamenhof kaj la plibonigojn proponitajn de diversaj oratoroj.

La sepa artikolo de la tiel voĉdonita „Aldono al la Regularo de la Kongresoj" estas jena:

VII. — En ĉiu grupo aŭ societo estas konsiderata kiel elektanta membro ĉiu ano de la grupo aŭ societo, kiu pagis jaran kotizon al la Centra Oficejo, difinitan de la Administra Komitato de la Centra Oficejo.

Mi ĉi tie tuj rimarkigos, ke, voĉdoninte tiun lastan artikolon, la rajtigitaj delegitoj respekteme agis konforme je la decido de la Kvina Kongreso kaj je la antaŭaj decidoj de la propagandaj societoj. Efektive, la rajtigitaj delegitoj ne prenis sur sin la rajton fiksi tiun kotizon, sed, per tiu artikolo transdonis tiun monan aferon al la Administra Komitato, kiun iliaj societoj speciale elektis por tiu celo.

Post la Antverpena Kongreso la prezidanto de la Administra Komitato, konforme je sia devo, petis do, ke tiu Komitato voĉdonu pri la fiksota kotizo. Post malrapida kaj serioza esploro la Komitato fine decidis, ke *„la opa sumo pagota por ĉiu aro de 25 elektantaj anoj estas fiksita, por la Oka Kongreso (Krakovo 1912), je unu spesmilo (2,50 frankoj)"*.

Kiel mi jam diris supre, kelkaj gazetistoj forte instigis la propagandajn societojn, ke ili malakceptu tiun lastan decidon, kaj ke ili elektu tamen rajtigitajn delegitojn por la Oka, kvankam ne paginte tiun kotizon. Kelkaj el niaj societoj, verŝajne influitaj de tiuj neĝustaj artikoloj, sekvis tiun konsilon. . . .

Unue oni diris, „ke la delegitoj en Antverpeno devis decidi subite pri la demando pri kotizo, antaŭ ol ili havis tempon dece konsiliĝi kun la grupoj kaj societoj, kiuj ilin delegis".

Tion dirante, oni forgesas, kiel mi ĝin supre rimarkigis, ke fakte tiuj societoj jam antaŭe estis akceptintaj la principon pri mona subtenado al la Oficialaj Institucioj. La demando estis do nek nova nek subita, sed de longe akceptita. Cetere, ne la delegitoj, sed la anoj de la Administra Komitato, speciale komisiitaj de la grupoj kaj societoj por tiu celo, fine decidis la demandon. Kaj tiu lasta, fina voĉdono neniel estis subita, neniel surprize estis improvizita. La anoj de la Administra Komitato „havis ĉiun necesan tempon por dece konsiliĝi kun siaj societoj"; kaj reciproke tiuj societoj bone konis la decidojn de la Sepa Kongreso, nepre sciis, ke la Administra Komitato devos fiksi la kotizon, kaj konsekvence ili havis la decan tempon por ordoni al siaj reprezentantoj en la Komitato, ke ili voĉdonu kontraŭ la pago de kotizo, aŭ (kio estas sama) ke ili voĉdonu, ke la kotizo estu nula. Cetere, se mi estas bone informita, kelkaj societoj, kies reprezentantoj en la Komitato voĉdonis kontraŭ la kotizo, agis tiel.

Sed nun oni ankaŭ malakceptas la decidon de la Administra Komitato, ĉar oni diras, „ke la novan regulon pri voĉrajtiga kotizo kaj enskribo aprobis nur 13 el la 35 membroj de la Administra Komitato".

En tio bedaŭrinde troviĝas tre grava eraro. Tion efektive rakontis kelkaj gazetistoj, kaj tiel ili erarigis la esperantistaron. Anstataŭ blinde akcepti tiajn asertojn kiel verajn, pli bone estus, se en tiaj gravaj cirkonstancoj oni sin turnus al la oficialaj dokumentoj kaj ilin atente legus. Jen la veraj faktoj tiaj, kiaj ili estas atestitaj de la dokumentoj publikigitaj en la *„Oficiala Gazeto"*:

Konforme je sia devo, Generalo Sebert, prezidanto de la Administra Komitato, prezentis proponon al la voĉdonado de la membroj de tiu Komitato. La 30 de Januaro 1912, dudek membroj estis sendintaj sian respondon al tiu unua propono. El tiuj dudek esprimitaj opinioj 13 akceptis simple la proponon, 3 ĝin akceptis principe, sed faris kelkajn kritikojn, kaj fine 4 ĝin malakceptis. Senprokraste, eĉ ne atendante pluajn respondojn, nia prezidanto, dezirante atingi pli plenan konsenton kaj volante, ke ĉio estu farita plej dece, modifis la tekston de sia unua propono, konforme je la faritaj kritikoj, kaj sendis al la komitatanoj duan definitivan proponon. Ĝi estas tiu dua lasta propono, kiu estas akceptita, kaj sekve la supre citita nombro 13 rilatas al la unuaj ricevitaj respondoj pri la unua propono, sed ne al la lasta.

Cetere tio estas perfekte klarigita en la Oficiala Gazeto. Jen la ekstraktoj, kiujn mi tiras el tiu gazeto (25 de Marto 1912, paĝoj 344—346) el la kvara cirkulero, sendita al la Administra Komitato de ĝia prezidanto:

„Mi ricevis jam 20 respondojn el niaj 35 kolegoj, kun kiuj mi interkonsiliĝis.

Tiuj respondoj, krom nur 4 el ili, aprobas la proponitan projekton, kaj nur 3 el tiuj 16 aprobintoj formulis kritikajn rimarketojn, kiuj povas pravigi kelkajn malgrandajn ŝanĝojn en la proponita teksto aŭ zorgojn por la aplikado de la Regularo."

— — — — — — — — — — — — — — — — — — — —

„Por forigi ĉiun dubon aŭ malklarecon, mi do preparis novan tekston de Regularo iom ŝanĝitan en kelkaj paragrafoj, kaj pli precizan en kelkaj detaloj, kiu memorigas la kialon de la proponitaj decidoj."

Kaj la cirkulero finiĝas jene:

„Mi sendas al vi tiun novan tekston, kiu anstataŭos la primitivan projekton de mia dua cirkulero, kaj mi petas vin, ke vi bonvolu diri al mi, kiel eble plej baldaŭ, ĉu vi aprobas tiun novan projekton."

Plie sub la cirkulero troviĝas lasta noto:

„Ĉar tiu nova teksto estas aprobita, ni represis ĝin, p. 335 sub la rubriko ‚Oficialaj Decidoj'."

Ĉu io povas esti pli klara? Ĉu dubo estas ebla pri la fakto, ke la 13 voĉoj (aŭ pli ĝuste 16) rilatas nur al unua nedefinitiva propono?

Estas vere, ke tiu noto bedaŭrinde ne sciigis, kiom da voĉoj fine akceptis la definitivan tekston; sed, kiam oni prudente sin okupas pri iu demando, kiam temas pri decido, kies konsekvencoj povas esti tre gravaj, kiam oni riskas maltrankviligi la tutan esperantistaron, oni devas agi pli singardeme. Estis facile sin turni al la prezidanto de la Administra Komitato por ricevi pliajn sciigojn. Tion mi faris. Kaj jen la respondo: pri la definitiva lasta teksto dudek unu komitatanoj voĉdonis, dek ok aprobis, tri malaprobis.

Nun la legantoj povos decidi ĉu, kiam el 21 esprimitaj opinioj 18 aprobis kaj nur 3 malaprobis, la voĉdono estas bona aŭ ne?

Tamen la protestantoj eble ne estos ankoraŭ kontentigitaj, ĉar ili diros: „estas 35 membroj en la Komitato, el kiuj nur 18 aprobis". Alivorte ili kalkulos la silentintajn anojn kiel malaprobantojn.

Tre certe ni ĉiuj bedaŭras, ke el la 35 komitatanoj estas 14, kiuj neniel respondis al la cirkuleroj de la prezidanto. Nu, en tio, kiu estas riproĉinda? Ĉu la prezidanto de la Komitato, kiu plej lojale kaj laŭleĝe plenumis sian devon, aŭ la silentemaj komitatanoj, kiuj akceptis oficon, kaj nenion faras? Cetere ĉiu, kiu iom vizitadas societojn, komitatojn aŭ parlamentojn, bone scias, ke ĉiam tiuj, kiuj volas kontraŭstari proponon, nepre voĉdonas. Nur tiuj silentas, kiuj konsentas, sed malmulte interesiĝas pri la afero, aŭ kiuj ne havas firman opinion.

El tio oni eble rajtas pretendi, ke anstataŭ diri, „ke el la 35 komitatanoj nur 18 akceptis la proponon“, kio estas maniero, kiu povas erarigi, estus pli ĝuste kaj pli proksime al la vero diri, „ke el la 35 komitatanoj nur 3 malaprobis la proponitan regulon“. Sed certe la plej bona maniero estas diri nek la unuan, nek la duan frazon, sed la veron.

Kion nun faros tiuj societoj, kiuj, blinde kaj senkontrole akceptinte la malverajn asertojn de kelkaj gazetistoj, publike voĉdonis kontraŭ la decido de la Administra Komitato, bazinte sian decidon sur falsaj konsideraĵoj?

Mi ne volas pli longe paroli pri tiuj malagrablaĵoj; mi nur simple volis korekti erarojn kaj konigi al niaj legantoj la verajn faktojn.

Kompreneble la diskuto tiel ne estas elĉerpita.

Kelkaj nun diras: „La Administra Komitato petas de ni monon. Ni ne volas doni ĝin, ĉar ni opinias, ke oni ĝin malbone uzos“. Tia diro estas kompreneble pura ofendo al la komitatanoj.

Ĝis nun la propagandaj societoj ne donis eĉ unu speson por la financa subtenado de niaj Oficialaj Institucioj. Estus vere strange, se ili volus kontroli kaj juĝi la spezadon de mono, kiun ili ne donis.

Ĝis nun nia Lingva Komitato kaj nia Akademio povis funkcii nur dank' al la mondonacoj de malavaraj samideanoj. Nur tiuj, kiuj pagis, havis kompreneble la rajton scii, kion oni faris per ilia mono.

Estonte la afero estos alia. Kiam fine la propagandaj societoj bonvolos kompreni, ke estas tempo, ke ili mone subtenu siajn Oficialajn Instituciojn, kiam ili fine bonvolos pagi, tiam ili kompreneble povos plene kontroli.

La Administra Komitato, elektita de la propagandaj societoj, por zorgi pri la financaj rimedoj de niaj Oficialaj Institucioj, difinos, por kiaj uzoj la Centra Oficejo elspezos la monon pagitan de la societoj, kaj kontrolos la en- kaj elspezojn.

Koncerne la demandon, ĉu la oficialaj delegitoj povos aŭ ne povos diskuti en Krakovo pri ĝenerala organizaĵo esperantista, mi ĉi tie ne parolos. La Antverpena Kongreso nomis komisionon por tiu celo; mi havas la honoron aparteni al tiu komisiono, kaj mi opinias, ke tio devigas min al silento. Same kiel mi submetiĝas al la rajtplene voĉdonitaj decidoj de la Rajtigitaj Delegitoj en Antverpeno kaj de la Administra Komitato, tiel same mi obeeme kliniĝos antaŭ la decido de la komisiono, eĉ se ĝi estas tute kontraŭa al mia persona opinio; ĉar, kiel komisionano, mi devas respekti la decidon de la plimulto el miaj kolegoj kaj protekti ilian liberecon.

„Disciplino estas la forto de la armeoj“, diris Napoleono. Ĉu iam la esperantistoj ankaŭ komprenos, kion signifas tiu nobla vorto, tiu necesa kondiĉo por sukceso, disciplino? . . . . *Carlo Bourlet.*

* * *

Por esti objektivaj, ni publikigas ankaŭ artikolon de peresperanta flanko. S-ro Th. Cart skribas en „*Lingvo Internacia*“ (Junio):

La nuna malkonsento.

Ĝin ni antaŭvidis, ĝin ni antaŭdiris, sed, kiam ni petis, petegis tie ĉi, ke oni agu singardeme en afero tiel grava, kiel estas internacia organizado, kiam ni petis, petegis tie ĉi, ke oni ĉion serioze, trankvile, malrapide ekzamenu kaj en **plena lumo,** oni nur respondis al ni per akraj vortoj, per riproĉoj, oni volis nin silentigi kaj . . . **agis** sekrete.

Kelkaj ankoraŭ nun, — kiel infanoj, kiuj frakasas la pri malbona vetero antaŭsciigantan barometron, — opinias, ke, se la sendependa gazetaro ne plu povus aŭdigi sian voĉon kaj proteston, se oni ĝin sukcesus bojkoti, ĉio ree estus „en ordo“.

Ne, sinjoroj, ho ne! Al la esperantistaro oni alportus tiamaniere ne la pacon, sed la silentadon de la morto.

La pacon tamen ni havos, ĉar ĝin ni ankaŭ volas, sed la pacon per la vereco, la justeco, la lumo kaj la respekto al ĉiuj sinceraj opinioj.

Nur unu komunan aŭtoritaton ni havas: la Fundamenton.

Alian, por **ĉiuj** esperantistoj devigan, ni esence ne havas kaj **ne povas** havi.

Ĉu tio plaĉas, ĉu ne, tio estas de neniu disputebla fakto. (Eĉ la decidoj de la Akademio, kvankam oficialaj, havas nur la valoron de gravaj, tute konsiderindaj konsiloj, sed ne de ordonoj. Leĝo, kaj sola leĝo por ĉiuj estas la Fundamento.)

Sekve en nelingvaj aferoj, en organizaj aferoj neniu, absolute neniu, nek homo, nek komitato, nek kongreso, povas forpreni de ni nian esencan, plenan liberecon.

Ĉu tio plaĉas, ĉu ne, tio estas ankaŭ de neniu disputebla fakto.

Sed ĉu tio signifas, ke neniu organizado ĉu nacia, ĉu internacia estas ebla, estas konsilinda?

Certe ne, kaj male.

Por ke Esperanto sukcesu, estas nepre necese, ke la esperantistoj kunigu sian agadon. Pro tio ni konsilas al ĉiuj apartaj samideanoj, ke ili kuniĝu en urbajn grupojn; al ĉiuj grupoj aŭ federacioj, ke ili kuniĝu en naciajn societojn, kaj, al tiuj ĉi lastaj, ke ili interrilatiĝu intime kaj regule por komuna, internacia agado, kiam necese.

Kaj vere, ĉu tia kunfederiĝo de niaj naciaj societoj kaj U. E. A., ĉu tia internacia organizaĵo, kies decidoj estus oficialaj por ĝiaj multaj membroj, ĉu tia potenca ligo, kiu kunigus, — ne kunfandante ilin, sed respektante ilian necesan sendependecon, — ĉiujn niajn fortojn, ne povus esti por ĉiuj tute kontentiga solvo?

Kial do oni ĝin ne akceptus bonkore kaj jam nun?

Al ĝi, por eviti anarhion aŭ ribelon, oni tamen venos fine kaj fatale.

Th. Cart.

* * *

Ni tre ŝatas S-ron Cart kiel eminentan kaj fervoregan samideanon. Sed li pardonu, se ni diras, ke ni tute ne komprenas lian vidpunkton pri la organiza demando. Li konstante parolas pri konfliktoj, kiujn naskas la fondo de poresperanta organizaĵo, kaj nevole altrudas sin al ni la konkludo, ke li tion nur faras por inciti la fajron de la kontraŭuloj. Neniel ni intencas ataki S-ron Cart, sed ŝajnas al ni, ke lia sintenado en la organiza demando estas kaŭzita de personaj motivoj, kiuj plej bone ne estus enmiksitaj en tiun ĉi aferon. Kiu serioze klopodas pri inter-

konsento, ne nur per vortoj, sed ankaŭ per laŭcelaj agoj, tiu ankaŭ trovos vojon por eviti konfliktojn.

Nia supozo pri intermiksitaj personaj motivoj estas pravigita per la bonega broŝuro de Dro Smulders, la lerta redaktoro de „*Espero Katolika*". S-ro von Frenckell jam rekomendis ĉi tiun broŝuron ĉe la fino de sia supre presita artikolo, kaj ankaŭ ni nur povas fari la saman. Oni profunde studu la verketon, kaj oni estos bone informita pri la vera stato de la demando pri organizo. La verketo enhavas resumojn de por- kaj kontraŭorganizaj artikoloj kun komentarioj, kaj plue precizigojn kaj proponojn de la verkinto, kiuj estas tute konsiderindaj. La malalta prezo ebligas al ĉiu interesulo, havigi al si la broŝuron.*)

Fine ni citu la efektive taŭgan proponon por interpacigo de la interbatalantaj partioj, kiun S-ro B. Kotzin faris en „*Ondo de Esperanto*" (Junio). Post mallonga, tre ĝenerala resumo pri la stato de la demando li daŭrigas sian artikolon jene:

Intence ni parolas ĝenerale, sendetale: — ni bone komprenas, ke pro detaloj de l'organizo ni ne devas malorganizi la tutan movadon. Pacon kaj unuecon ni bezonas, ĉar nur unueco faras la forton kaj ĉar alie oni juste konsilos al ni: „*Kuracisto, kuracu vin mem!*" Efektive, ni kantas belan, entuziasman himnon: „sur neŭtrala lingva fundamento . . . la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian" kaj samtempe en nia propra esperantista tendaro „frat' fraton atakas ŝakale". Jes, vere ŝakalmaniere atakas centran organizon kelkaj organoj. Ili senpermese publikigas privatajn leterojn, ili fosas ne sian sulkon, sed ian sterkon, kaj en la realeco ili subfosas Esperanton, ili forsegas la branĉon, sur kiu ili mem sidas. Ho, niaj malamikoj certe rememoras pri la sorto de Pollando kaj certe ili jam triumfas: — Esperanto volas sin memmortigi!

Do, kion fari? Post kelkaj monatoj en Krakovo ja okazos nia Jubilea Internacia Kongreso kaj, eble, okazos Internacia Skandalo dank' al personoj, kiuj, rimarkinte kulon sur frunto de sia amiko, tuj elpoŝigas revolveron kaj pafas. La kulon ili maltrafos, sed la kranio de l'amiko certe estos frakasita . . .

Ĉu ni permesos frakasi Esperanton? Tradicie niaj kongresoj, — precipe la jubilea, — devas esti *frataj festoj*. Por evitigi la minacantan skandalon ni proponas:

1. Dume utiligi pli neŭtralan kaj pli elementan organizformon, nome: krei Internacian Komitaton el prezidantoj de naciaj societoj. Tiamaniere, grado post grado senskandale ni atingos pli perfektan, parlamentan formon.

2. Rezolucie malaprobi la „ŝakalajn atakojn". La kongresanoj diru al la „pacaj" batalantoj: vi ne estas veraj esperantistoj, vi estas nur amikoj aŭ malamikoj de S-roj Cart, Sebert, Hodler ktp., vi forgesis pri via samideaneco, tial vi ne estas esperantindaj. Kiu partio estas prava? — la demando ne estas grava: — la ambaŭ partioj estas kulpaj, ĉar ili ambaŭ militas. Ni, simplaj soldatoj, volas idee labori, ni volas propagandi, sed bedaŭrinde via interfrata batalado kaj insultado tute paralizas nian aferon. Do, iru for, se vi ne povas aŭ ne volas restarigi pacon kaj unuecon! *B. K.*

* * *

Ni vidas, ke S-ro Kotzin havas trafan opinion pri la vera kaŭzo de la nuna malkonsento. La disputo pri la demando „Ĉu por aŭ per Esperanto" ne estas tiel grava, kiel ŝajnigas ĝin la peresperantanoj. Ĝi estas nur preteksto por kaŝi la veran motivon de la atakoj, kiujn kelkaj franclingvaj samideanoj direktas kontraŭ personoj, ne ŝatataj de ili. Sed ili ne forgesu, ke Esperantujo konsistas ankoraŭ el multe pli da aliaj nacianoj, kiuj tute ne interesiĝas pri la internaj aferoj de la francoj. Ni alilandaj esperantistoj ne volas esti partianoj de tiu aŭ tiu franca eminentulo, sed samideanoj celantaj la komunan, plej gravan taskon, nome la progreson de Esperanto. La plej certajn garantiojn por laŭcela progreso de nia lingvo donas al ni bone aranĝita poresperanta organizo internacia; pro tio ni deziras ĝian starigon, tute egale, ĉu S-ro A. aŭ S-ro Z. estas favoraj al ĝi aŭ ne. Ni ne bezonas prizorgantojn, kiuj atentigas nin pri la personeco de la ĉefaj reprezentantoj de la poresperanta ideo; ni estas sufiĉe memstaraj kaj prudentaj por elekti kiel kondukantojn de la dezirita organizaĵo nur tiujn personojn, kiuj ŝajnas al ni fidindaj por tiu posteno.

Do, ni sincere apogas la proponon de S-ro Kotzin: se la demando pri organizo estos ektuŝata dum la Oka Kongreso, la kongresanoj efektive estu „pacaj batalantoj", kaj ili evitu la akrecon, kiu bedaŭrinde sin montris jam en la kunsidoj en Antwerpen. Oni ne faru al la mondo la ridigan spektaklon de malpacema jubilea kongreso, sed oni klopodu esti vera amiko de la progreso de Esperanto kaj ne partia amiko de kelkaj personoj, kiuj pro siaj specialaj interesoj kaj pro ambicio ne atentas la fakton, ke ni unue estas esperantistoj kaj nur due esperantianoj!

Ek.

Aufruf an die deutschen Esperanto-Gruppen!

Betrifft Zahlung der Beiträge für die Entsendung von Delegierten zum Krakauer Kongress.

Da ich von verschiedenen Seiten gefragt worden bin, wie sich die Gruppen bezüglich der Zahlung von Beiträgen an das Centra Oficejo verhalten sollen, so teile ich hierdurch meine persönliche Ansicht mit und bemerke dazu, dass bereits verschiedene Gruppen, unter anderen die Gesellschaft Esperanto, Dresden,

*) Vidu la bibliografian parton de tiu ĉi numero.

Lübecker Esperanto - Gesellschaft, der Bromberger Esperanto-Verein, ihre Beiträge an das Centra Oficejo nach Paris abgeführt haben. Die Sachlage ist folgende:

Auf dem Antwerpener Kongress ist durch einen Zusatz zur Geschäftsordnung der Kongresse (VII) beschlossen worden, dass ein Beitrag gezahlt werden soll für das Recht, Delegierte zu entsenden. Der betreffende Antrag war von Herrn von Frenckell gestellt worden. In Ausführung dieses Beschlusses hat das *Administra Komitato* beschlossen, dass die Gruppen für je 25 Mitglieder 1 Sm. zu zahlen haben, und dass jede Gruppe, um in die Liste der stimmberechtigten Gruppen eingetragen zu werden, 2 Sm. zu zahlen hat, datür aber unentgeltlich die „*Oficiala Gazeto*" erhält.

Es wird nun von verschiedenen Seiten empfohlen, die Zahlung zu verweigern. Dieser Rat ist angetan, in Krakau Unzufriedenheit hervorzurufen, denn zweifellos muss das Administra Komitato auf Grund der mitgeteilten Beschlüsse jedem Delegierten das Stimmrecht absprechen, resp. wird keine Delegiertenkarte ausgeben können an solche Personen, die nicht den Nachweis erbringen, dass ihre Gruppe oder Gauverband oder Landesgesellschaft die entsprechenden Beiträge geleistet hat. Es ist daher eine Vogel-Strauss-Politik, wenn man die Beiträge unter irgendwelchen Vorwänden verweigert, und man dient nicht der Esperantosache, wenn man sich auf einen solchen Standpunkt stellt. Jedenfalls sollten wir Deutschen wie im Vorjahr mit gutem Beispiel vorangehen und uns durch keinerlei Rundschreiben beeinflussen lassen, das zu unterlassen, was allein korrekt ist und der Förderung unserer Sache dient.

Ich bitte daher alle deutschen Gruppen, die bisher noch nicht ihren Beitrag an das Centra Oficejo gesandt haben, dies sobald als irgend möglich zu tun.

Dr. M. Kandt.

VIII. Universala Kongreso de Esperanto.

Krakovo, 11—18 Aŭgusto 1912.

La kongresa programo fariĝas ĉiam pli riĉa kaj abunda. Al la teatraĵoj, kiujn mi citis en la antaŭa artikolo, aliĝas nun prezentado de la opero „*Halka*", kiu estos ludata dum la Kongreso. En tiu rilato oni povas kompari la Okan kun la Kvara. En Dresden oni unuafoje prezentis al la esperantistaro dramon, kies rolojn ludis profesiaj aktoroj, same en Krakovo la kongresanaro havos okazon, vidi la unuan operon en Esperanto, prezentotan de profesiaj geartistoj. La muziko de „*Halka*", la belegaj dancoj, la simpla kaj tamen kortuŝa agado certe postlasos daŭran impreson ĉe la ĉeestontaro.

Por la literatura konkurso alvenis 53 verkoj. La konkurso do, almenaŭ laŭ la kvanto, plene sukcesis. Laŭ la temoj la unuan lokon okupas la poezio kun 27 verkoj, la duan la beletristiko kun 15 verkoj kaj la lastan la scienco kun 11 verkoj. Inter la beletristikaĵoj tri verkoj estas atentindaj pro sia neordinara amplekso. La plej grandan parton de la konkursaj laboroj alsendis germanaj samideanoj; la dua loko preskaŭ egalnombre apartenas al francoj kaj angloj.

La Organiza Komitato tiel zorgas pri la kongresanoj, ke ĝi eĉ ne forgesis pri tiuj el ili, kiuj apartenas al la kategorio de tabakfumantoj. Nome dank' al efika kunhelpo de la vigla grupo „Centra Viena Esperantejo", la imp. reĝa ĝenerala Tabak-Administracio en Wien konsentis prepari okaze de la Oka kelkajn specojn de cigaroj kaj cigaredoj, kiuj estos enpakitaj en specialaj, belaj lignaj skatoletoj, kiuj ekstere kaj interne estos provizitaj per vidaĵoj de Krakovo kaj Esperantaj surskriboj, rilantataj la Kongreson. La cigaroj estos vendataj en la Akceptejo.

Tiu ŝajne malgrava sukceso de Esperanto estas tamen atentinda, ĉar ĝi montras, ke nia movado trovis aprobon ĉe oficiala registara institucio.

La Sepa estis la unua, dum kiu kinematografa entrepreno faris bildojn, kiuj reprezentas kelkajn el la kongresaj scenoj. Tamen bedaŭrinde la nombro de la bildoj estis tro malgranda. La Organiza Komitato de la Oka sukcesis atingi en tiu rilato veran rekordon. Nome la fame konata firmo Pathé Frères sendos al Krakovo specialan aparatiston, kiu dum la tuta kongresa semajno fotografos ĉiujn pli gravajn scenojn de la Oka, tiel ke la filmoj reproduktos kvazaŭ „historion" de la jubilea Kongreso. Ĉiun pli gravan okazontaĵon „eternigos" la kinematografo. La elspezojn, ligitajn kun tiu aranĝo, pagos la imp. reĝa ministerio por publikaj laboroj.

Tiun fakton oni devas konvene taksi, ĉar ja la Kongresaj filmoj migros en la tutan mondon kaj faros al nia movado certe pli grandan propagandon, ol dekoj da aliaj reklamiloj, kiujn oni klopodas elpensi. Tamen ĉio homa devas havi sian „sed" . . . Tiu „sed" ne mankas ankaŭ en nia okazo. Nome, se la jubilea Kongreso ne estus sufiĉe multenombra, la kinematografaj bildoj ne havus ĉe la neesperantista publiko grandan efikon. Eble tiu propagandilo havus tute kontraŭan efikon, ol ĝi efektive celis. Al la ekstera publiko imponas ĉiam la nombro; se do sur la bildo, prezentanta ekz. la inaŭguracian kunsidon de la Kongreso, estus videbla nur tute negranda aro da partoprenantoj, la rigardantoj certe ne estus konvinkitaj pri la „potenca" disvastiĝo de Esperanto, kiel ĉiam asertas ĝiaj adeptoj, des pli, ke la filmoj prezentos ja scenojn el Kongreso, okazinta en la jubilea jaro de nia movado. Tion la esperantistaro ne forgesu! La Oka devas esti bona okazo, por montri al la tuta mondo nian forton. Ĉiu, kiu povas veni Krakovon, ne hezitu aliĝi, ĉar estas malofta okazo, kiun oni devas bone uzi por propagandi nian aferon en la tuta mondo.

Tiuj, kiuj aliĝos sufiĉe frue, povos profiti la fervojan rabaton, kiu konsiderinde malaltigos la alkongresan vojaĝon. La rabatiloj estas jam pretaj kaj dissendataj al ĉiuj aliĝintoj. Personoj, kiuj intencas ĉeesti la Okan, bonvolu ne prokrastadi sian aliĝon, ĉar se ili avizos sian partoprenon nur en la lasta momento t. e. en Krakovo mem, ili kompreneble ne povos profiti la rabaton.

Napoleono.

Germana Kroniko

Ĉiuj grupoj kaj izolitaj samideanoj estas petataj, sendi al ni kiel eble plej akurate mallongajn raportojn pri sia agado kaj pri la progresoj de Esperanto en sia urbo aŭ regiono. La raportoj devas alveni ne pli malfrue ol la 25an de ĉiu monato.

La 25-jara jubileo de Esperanto estis solene festata en ĉiuj partoj de Germanujo. La lokaj gazetoj de preskaŭ ĉiuj urboj, en kiuj loĝas esperantistoj, aperigis artikolojn pri Esperanto kaj ĝia disvastiĝo tra la tuta mondo, ĝia taŭgeco por la internaciaj rilatoj kaj pri la jubileo.

Pri la diversaj aranĝoj de la esperantistaj grupoj ni ricevis tiom multe da raportoj, ke ni iom detale povas raporti nur pri la eksterordinare gravaj aŭ specialaj okazintaĵoj. Ni ankaŭ ricevis kelkajn el la dum la festoj faritaj paroladoj kaj deklamitaj poemoj, kiujn ni bedaŭrinde ne povas aperigi pro manko de loko. Sed ni kore dankas la alsendintojn pro la abunda materialo, kiun ni konservos kiel ĝojigan memoraĵon pri la jubilea tago.

El la ligoj.

Rejnlanda ligo la 14an de Julio aranĝos en Essen a. Ruhr sian nunjaran ĉefkunvenon, kune kun delegita kunveno de la rejna-westfalia distrikto de U. E. A. Por la kunsidoj estas rezervita la „Kammermusiksaal" en „Städtischer Saalbau". Posttagmeze okazos ekskurso al Werden, vespere festkunsido. Proponojn kaj demandojn, koncernantajn la ligotagon, oni direktu al la prezidanto de la ligo, S-ro referendario Arntz, Godesberg, proponojn rilatantajn la amuzan parton de la tago al S-ro F. Pillath, adr. Friedrich Krupp A.-G., Essen a. Ruhr.

Lokaj raportoj.

Auerbach i. V. La novan kurson, gvidatan de S-ro Gemeseus, supera instruisto ĉe la reallernejo, partoprenas 25 personoj.

Augsburg. La loka grupo aranĝis la 12an de Majo kunvenon en Aystetten. En sia alparolo S-ro Dro Pfluger povis saluti delegitojn de la Societo Augsburg, de la grupo de policistoj kaj de Internacia Katolika Unio. Amuzaj prezentadoj kaj danco ankoraŭ longe unuigis la partoprenantojn.

Bamberg. Esperanto-Unuiĝo festis la jubileon la 2an de Junio en „Altenburg". Kantoj, paroladoj kaj tostoj okazis, ankaŭ danco kaj lampionilumino. — La unuiĝo eldonis novan gramatikon (prezo 30 Pf.) kaj flugfolion „Bedeutung der Esperanto-Sprache" oder „Warum muss jedermann Esperanto lernen?" (po 30 ekz. 30 Pf.). — Gimnaziano J. B. Schmidt pentris portreton de la Majstro por la kunvenejo de la grupo.

Berlin. Esperanto-Gruparo aranĝis la 1an de Junio, vespere, grandan publikan kunvenon en „Bürgersaal" (burĝa salono) de la urba domo. Post sia saluta parolado S-ro patentadvokato Schiff, prezidanto de la gruparo, laŭte legis la leterojn de S-roj sekretaj konsilistoj Prof. Dro Schmidt el Potsdam kaj Prof. Dro Kohler el Berlin, kiuj esprimis sian simpation por nia lingvo kaj sian bedaŭron, ke ili ne povis partopreni la feston. Plue li komunikis leteron de S-ro Vezey Strong, antaŭa urbestro de London, kiu skribis pri la graveco de Esperanto. La unuan festparoladon faris la konata astronomo, sekreta konsilisto Prof. Dro Förster. Per interesaj vortoj li montris la gravecon de internacia helplingvo por la tuta kulturo. Post li S-ro pastro Hans Francke entuziasme defendis la esperantistojn kontraŭ la diversaj riproĉoj, kiuj ofte estas farataj al ili, kaj li instigis la ĉirkaŭ 400 ĉeestantojn, vigle daŭrigi la laboron por Esperanto. Ĉe la fino de la bonsukcesa kunveno kelkaj eksterlandaj samideanoj: sviso, bohemo, hispano, polo, turko, hungaro kaj rumano, salutis la ĉeestantaron en la nomo de siaj landoj, per tio praktike pruvante al la neesperantistoj, kiel bone Esperanto taŭgas por la interkompreniĝo inter diversnacianoj. — La 2an de Junio posttagmeze la Berlina esperantistaro faris ekskurson al Schlachtensee kaj vespere kolektiĝis en Industrie-Festsäle, kie okazis amuza festo kaj balo. Membroj de Grupo Charlottenburg vigle ludis la teatraĵon „Tie ĉi oni parolas esperante". F-ino Maria Lindecke deklamis prologon, F-inoj Nickel el Potsdam kaj Pielke (komercistina grupo) jen sole jen kune kantis kelkajn belajn kantojn.

Berlin-Britz. La 7an de Junio S-ro instruisto Adler, membro de la grupo Neukölln, faris propagandan paroladon en instruista unuiĝo. Kurso estos aranĝata dum la venonta aŭtuno.

Berlin-Neukölln. La 9an de Junio S-ro instruisto Wittbrodt faris propagandan paroladon en unuiĝo de kristanaj junuloj. La unuiĝo intencas aranĝi esperantan kurson dum la venonta aŭtuno en sia propra domo.

Berlin-Wilmersdorf. La sciigo pri la terura akcidento, kiu trafis la grupon de Wilmersdorf, certe jam atingis ĉiujn germanajn samideanojn per la ĉiutagaj gazetoj. La grupo, fondita jam antaŭ kelkaj jaroj, komence ne bone progresis. Nun fine ĝi iom post iom kreskis, kaj la 22an de Junio ĝi aranĝis sian unuan ekskurson, sur Havel, kiun partoprenis pli ol 40 personoj. Vespere kelkaj el la partoprenintoj hejmenveturis per la fervojo, dum la plej multaj, 34 personoj, reveturis per motorboato. La boato estis bele iluminita per lampionoj kaj la tuta societo estis en bona humoro. Subite okazis la teruraĵo: pro ĝis nun ne ankoraŭ klarigita kaŭzo la malgranda motorŝipo alpuŝegis grandan vaporŝipon, kiu venis el la kontraŭa direkto. La antaŭparto de la boato tute disrompiĝis, kaj la ŝipeto rapide subakviĝis. Ekster du personoj ĉiuj estis savataj. La du dronintoj estas la sekretario de la grupo, S-ro instruisto Lepinies el Wilmersdorf kaj S-ino vidvino Kümmel. La lasta ankoraŭ ne estis esperantistino, sed interesulo, kiu la unuan fojon troviĝis inter esperantistoj. La kadavroj estis trovataj nur post kelkaj tagoj. La 29an okazis la enterigoj, kiujn partoprenis delegitoj de Berlin'aj grupoj.

Bochum. La grupoj de Bochum kaj Wattenscheid kune festis la jubileon. Festparolado: S-ro prezidanto Halbfell el Wattenscheid. Kantoj kaj muzikaĵoj.

Bonn. Godesberga Esperanto-Unuiĝo „Godea" malfermis la 30an de Majo ĉi tie kurson.

Breslau. Festkunvenon, kiun ĉeestis multaj gastoj, okazigis la loka grupo dimanĉon, la 2an de Junio antaŭtagmeze. La kantunuiĝo de poŝt- kaj telegrafaj oficistoj, sub gvidado de S-ro Aumann, prezentis du kantojn: „Laŭdu ni Dion" kaj „La Espero". S-ro

supera poŝtpraktikanto Arnold Behrendt pruvis en interesa parolado, ke nuntempe ne plu estas eble, trudi iun nacian lingvon al aliaj nacioj; plue li aludis la malfacilecon de la interpretado dum internaciaj kongresoj kaj fine petis la ĉeestantojn, favori nian lingvon kaj helpi, ke baldaŭ Germanujo estu la unua en la vico de la nacioj ankaŭ rilate al Esperanto. Ekspozicio de gazetoj, libroj kaj eksterlandaj poŝtkartoj estis aranĝita.

Bromberg. La grupo festis la jubileon, farante ekskurson al Mühlthal. Paroladoj de S-roj Szymanowski kaj Dro Kandt. Ludoj kaj danco.

Chemnitz. La 11an de Junio la Chemnitza Esperanto-Ligo okazigis sian ĝeneralan jarkunvenon. Estraro: S-roj W. Hahn (prez.), Otto (vicprez.), Dro Wicke (sekr.), Linke (kas.), S-roj Münch kaj Kirchner (anstataŭantoj de la sekretario kaj kasisto). S-ro Dro Wicke faris interesan raporton pri la interna laboro kaj pri la propagando de la ligo kaj montris la programon por la nova jaro.

— Unua Chemnitza Esperantista Societo elektis en sia ĉefa jarkunveno la jenan estraron: S-roj Werner (prez.), Fabian (vicprez.), F-ino Kara (1a kas. kaj bibl.), F-ino Herold (2a kas.). Oficejo: S-ro fervoja asistanto Werner en Siegmar. La ĝisnuna fervora kasisto, S-ro supera poŝtasistanto Leupold, bedaŭrinde fordonis sian oficon pro manko de tempo. Honora prezidanto de la societo estas S-ro Dro Zamenhof. Delegito de U. E. A.: S-ro inĝeniero Fabian, vicdelegito: S-ro supera poŝtasistanto Leupold. — La kunvenoj de la societo okazas de nun en kafejo „Bienenstock", ĉiumarde je la 9a vespere.

Danzig-Zoppot. Jubilea festo en Thalmühle apud Zoppot. Cirkaŭ 80 partoprenintoj. Paroladoj, deklamoj kaj kantoj, parte germane, parte esperante.

Dortmund. Kun helpo de la Esperanto-Grupo Münster S-ro Tobusch faris propagandan paroladon en „Unuiĝo de horloĝistoj de Dortmund".

Dresden. La Dresdena esperantistaro solenis la jubileon en la belege ornamita salono de „Künstlerhaus" la 2an de Junio antaŭtagmeze. Inter la multegaj ĉeestantoj troviĝis ankaŭ reprezentantoj de la ĉefa stabo, de la artileria depoto, de la registaro kaj de la urbaj oficistaroj. Kanto de esperantista ĥoro, sub gvidado de F-ino Lehner, malfermis la festakton. La salutparoladon faris S-ro Dro Arnhold, S-ino Elb prezentis prologon, de ŝi mem verkitan, kiu finiĝis per kelkaj, de S-ino Prof. Hankel verkitaj Esperantaj versoj. La ĉefa oratoro de la festo estis S-ro pastro Lösche el Wurzen, kiu per temperamentaj kaj ofte humorplenaj vortoj parolis pri la Majstro kaj lia genia verko. S-ro Dro Arnhold donacis al la Societo Esperanto grandan pentritan portreton de la Majstro. Posttagmeze la esperantistoj denove kolektiĝis en Künstlerhaus, kie estis aranĝita „ĝardenfesto". Plej diversaj amuzaĵoj estis preparitaj de la grupanoj; pafbudo, humora desegnejo, budo, en kiu humoristo prezentis siajn kantojn, ekspozicio de la objektoj por tombolo, vendejo por kukaĵoj, ornamitaj per Esperantaj steloj, en aparta budo estis aĉeteblaj ludaĵoj por infanoj, en librejo oni povis rigardi kaj aĉeti Esperantajn librojn, poŝtkartojn kaj insignojn. Kolekto de kuriozaĵoj, kiuj ĉiuj en humora aŭ satira maniero koncernis Esperanton, allogis multajn rigardantojn. Anoj de la sinjorina grupo, vestitaj kiel ĥininoj, en riĉe ornamita tendo prezentis teon. Eĉ „Kasperle"-teatro, en kiu oni ludis Esperantajn teatraĵojn, ne mankis. En la granda salono de Künstlerhaus okazis la unua prezentado de la teatraĵo „Ein Esperanto-Fünfuhrtee", verkita de S-ro Sergius Winkelmann. Sekvis ankoraŭ diversaj aliaj prezentaĵoj kaj fine balo. — S-ro kapitano Treitzschke gvidas kurson, kies partoprenantoj estas oficiroj.

— La fondiĝfesto de la Sinjorina Grupo kaj la gaja vespero de la klubo Antaŭen ĝis la venko bone sukcesis.

— Grupo 5a (Obstine Antaŭen) la 19an de Majo faris ekskurson al Langebrück. 40 partoprenintoj.

— Grupo 8a (tramistoj) eksiĝis el la Societo Esperanto por fariĝi memstara grupo.

Ebersbach (Saksujo). La 2an de Junio la najbaraj grupoj kunvenis sur *Hainberg* en Ebersbach por festi la jubileon. Malgranda ekspozicio estis aranĝita. 30 gesamideanoj kaj iliaj gastoj ĉeestis.

Essen a. R. Laŭ instigo de S-ro Pillath la *Verkehrsverein* decidis donaci al la lernejanoj de Essen 5000 ekzemplerojn de la bela gvidlibro tra Essen, kiu enhavas Esperantan resumon. Tio estas bona propagando por nia lingvo. — En sia ĉefkunveno, la 5an de Junio, la grupo decidis inviti la Germanan Kongreson 1913 al Essen. La nove elektita estraro estas: S-roj F. Pillath (prez.), A. Ehricke (vicprez.), E. Wengler (1a sekr.), J. Bernstein (2a sekr.), H. Eichelhardt (kas.), H. Sult (bibl.), H. Bettges kaj F-inoj G. Wehe kaj P. Schulte (geasistantoj).

Friedrichsthal a. Saar. La 23an de Junio S-ro Omlor el St. Ingbert faris propagandan paroladon. Eskpozicio de esperantaĵoj trovis grandan intereson.

Geyer i. Erzgeb. Laŭ instigo de S-ro M. Fleischer el Königshütte O.-Schles., naskita en Geyer, la tieaj esperantistoj fondis grupon. La nova grupo aliĝis al G. E. A. Prezidanto fariĝis S-ro posamenta fabrikanto Arthur Pilz. La kunvenoj okazas ĉiuvendrede en Hotel Bahnhof. La oficon de instruisto prenis sur sin S-ro komercisto Süss.

Godesberg a. Rh. Esperanto-Unuiĝo „Godea" ricevis de G. E. A. la permeson, aranĝi ekzamenojn pri la unua grado. — Ĉiuj samideanoj estas invitataj viziti la banlokon Godesberg, kiu jam de kelkaj jaroj estas konata inter la esperantistaro kiel esperantista somerrestadejo (Rejna Esperanto-Kolonio).

Gommersheim. S-ro Brauch gvidas novan kurson.

Görlitz. Societo Zamenhof aranĝis dum la jubilea tago ekskurson al Nikolausdorf. S-ro Dro phil. Goebel per parolado malfermis la oficialan feston. Sekvis deklamo „*Preĝo sub la verda stelo*" kaj teatraĵo, verkita por ĉi tiu festo. Inter la 300 ĉeestantoj troviĝis multaj gastoj, ankaŭ delegitoj de Esperanto-Grupo Görlitz, Grupo Weisswasser, Grupo Lauban. La fondinto de la Societo Zamenhof, S-ro Mally estis aklamata kiel honora membro de la societo. S-ro Dro Goebel transdonis al li artefaritan diplomon en valora kadro.

Halle a. S. La florkorson, kiu okazis la 2an de Junio sur la rivero Saale, partoprenis la esperantistoj, veturante en belege ornamita boato, kiu estis signita per la verda stelo kaj la surskribo „Esperanto". Tiu ĉi boato estis premiata. — La jubileon festis la tiea grupo vespere per lumbilda parolado.

Hamburg-Altona. Loka ligo. Por festi la jubileon la esperantistaro kunvenis en restoracio Stichler, kie S-roj advokato Dro Cohen kaj sanitara konsilisto Dro Mybs faris paroladojn.

Kiel. Por festi la 25-jaran jubileon, la loka grupo aranĝis ekskurson al „Villa Fernsicht", kiun partoprenis entute 30 personoj, inter ili anoj de la nove fondita „Esperanto-Junularo". — La jahto „Esperanto" de S-ro ferdekoficiro Poock bone propagandas nian lingvon. Ĝi ofte estas alvokata de ŝipvojaĝantaj samideanoj, kiuj vidis la verdan flagon ĉe la mastpinto.

Landau i. Pf. La Pfalz'aj esperantistoj tie kune festis la jubileon. Krom la grupo Landau ĉeestis la samideanoj el Ludwigshafen, Kaiserslautern, Gommersheim kaj St. Ingbert.

Leipzig. S-ro Bennemann, membro de la Instruista Grupo, faris paroladon pri Esperanto en la ligo de filatelistoj.

— Societo Leibniz uzis la „Margaretan Tagon" por propagandi nian lingvon. La kiosko, en kiu anoj de la societo vendis florojn, estis ornamita per esperantaj flagoj. Krom tio ĉiu aĉetanto donace ricevis flugfolion „Esperanto sur unu folio". — S-ro advokato Schönwald verkis artikolon, aperintan en „*Leipziger Neueste Nachrichten*" pri *Esperanto kaj Germaneco*, kiu kaŭzis interesan diskuton.

Leisnig. La grupo festis la jubileon per ekskurso al Hochweitzschen. — La 19-an de Junio okazis lampion-promenado de Klosterbuch al Leisnig.

Lübeck. Esperanto-Societo dum la lasta monato faris multajn belajn ekskursojn en la ĉirkaŭaĵon. — La 21an de Majo F-ino Drückhammer komencis privatan kurson, kiun partoprenas 7 sinjorinoj. — Instigitaj de la grupo, la gazetoj de Lübeck de tempo al tempo aperigas artikolojn pri Esperanto.

Memmingen. La 2an de Junio la ŝvabaj gesamideanoj tie kunvenis por kune festi la jubileon. Multnombre la esperantistoj el München, Augsburg, Kempten, Kaufbeuren, Oberstdorf, Leutkirch, Biberach a. R., Babenhausen, Legau kaj Lautrach partoprenis. Post komuna vizito de la urba muzeo, ĉiuj kolektiĝis en la ĉambrego de la urba domo, kie la festoratoro, S-ro Prof. Dro Ledermann el Augsburg, konvinke priparolis la temon „25 jaroj de Esperanto". La urba magistrato sendis al la kunveno oficialan reprezentanton, S-ron juĝkonsiliston Bingger, kiu salutis la kunvenintojn, dezirante al nia afero bonan sukceson. Ekspozicio de esperantaĵoj estis aranĝita en apuda ĉambro. Posttagmeze oni gaje kunvenis ĉe koncerto kaj danco.

München. La ses esperantistaj unuiĝoj kune festis la jubileon en la granda salono de Malthäser-Brauerei, kiu estis bele ornamita per Esperantaj flagetoj. S-ro Dro Pröls parte esperante, parte germane salutis la ĉeestantaron. S-ro kapitano Meier germane parolis pri „25 jaroj de Esperanto". S-ro Poncet el Lyon, franca redaktoro, kiu precipe okupiĝas pri la propagando de Esperanto, promesis en Esperanta parolado, reveni al München komence de Aŭgusto kun granda propaganda karavano, por partopreni la 3an kongreson de la sudgermanaj esperantistoj.

Münster i. W. Esperanto-Grupo ricevis la permeson, elmeti Esperantajn gazetojn kaj broŝurojn en la publika *Bücher- und Lesehalle*. Per tio kelkaj personoj jam estas gajnitaj al Esperanto. — S-ro Sahler jun. antaŭ nelonge faris Esperantan paroladon pri Münster, S-ro Beumer pri *la dua vidado* (das zweite Gesicht), okazintaĵo, kiun oni en Westfalio precipe ofte rimarkas. — La 16an de Junio la grupoj Münster kaj Rheine kune festis la jubileon de Esperanto en Bagno apud Burgsteinfurt.

Plauen i. V. S-ro Dro Dehne, kiu en la saksa parlamento jam kelkafoje protektis Esperanton, fariĝis supera urbestro de Plauen. La Esperantista Grupo sendis al la nova urbestro salutleteron, kiun S-ro Dro Dehne respondis Esperante.

Posen. Grupo „Verda Stelo", por festi la jubileon, aranĝis la 9an de Junio vaporŝipekskurson al Weissenburg.

Prien. Dum la pentekosta dimanĉo okazis en Prien granda kunveno de geesperantistoj el Salzburg, Reichenhall, Prien kaj München. Posttagmeze la 50 partoprenantoj vizitis la *Herreninsel* kaj la reĝan kastelon, vespere okazis festa kunveno en Hotelo *Kampenwand*.

Recklinghausen. En la loka gazeto aperas kurso pri Esperanto. Laŭ instigo de la Esperanto-Grupo de Münster, la sama gazeto de nun ankaŭ regule aperigos propagandajn artikolojn.


Reichenbach i. V. La 11an de Junio komenciĝis nova kurso kun 17 partoprenantoj sub gvidado de S-ro Dro Otto Linse.

Rostock. Post kiam la kurso en Warnemünde, aranĝita de la grupo Rostock, finiĝis, la grupanoj klopodas gajni anojn por nova kurso, komencota en aŭtuno. — La grupo okazigis konkurson, en kiu estis premiata la laboro de S-ro stud. med. Max Weber.

St. Ingbert. S-ro ĉefinstruisto Michael Lutz, ĝisnuna prezidanto de la loka grupo, pro profesiaj laboroj demetis sian oficon. Ĉiujn laborojn de la prezidanto prenis sur sin S-ro August Omlor jr. — La jubileon la grupo festis la 30an de Majo; oratoro: S-ro A. Omlor.

Wiesbaden. La 1an de Junio la grupo solene festis la jubileon de nia lingvo en la plej granda salono de la urbo. La prezidanto, S-ro L. Istel, en sia kutima kortuŝanta maniero faris la festparoladon, klarigante la gravecon de Esperanto kaj raportante pri ĝiaj sukcesoj. S-ino Fürth poste deklamis prologon, verkitan de S-ro Dro J. Hanau, S-ino Marie Thon-Zintgraff prezentis kelkajn Esperantajn kaj germanajn kantojn. Ankoraŭ aliaj prezentaĵoj, muzikaĵoj, paroladoj, deklamoj, teatraĵo kaj fine tombolo kaj danco sekvis.

Zittau i. Sa. Jubilea festo la 2an de Junio. Oratoro: S-ro Fr. Schmidt. Muzikaĵoj, kantoj kaj balo. *A. H.*



Gazetaro

Kelkaj pripensindaj vortoj.

Ĉiu el niaj propagandistoj certe jam spertis, ke ne estas facile, instigi la redaktorojn de ĉiutagaj gazetoj al la publikigo de artikoloj aŭ eĉ nur notoj pri la Esperanta afero. Plej ofte, se oni ne havas personajn interrilatojn kun la redaktoroj, ili ĵetas la koncernajn manuskriptojn alsenditajn en la paperkorbon, kiu en ĉiu redakcio ja estas sufiĉe granda por akcepti

multege da „sensencaĵoj“, kia Esperanto ankoraŭ estas en la okuloj de la plej granda parto de la ĵurnalistoj. Ekzistas ankaŭ multaj naciaj gazetoj, kiuj ĉe la nura aŭdo de la vorto „internacia“ ektremas, kvazaŭ la patrujo estus en danĝero. Ĉu tial ne estas strange, ke ĝuste tiaj germanaj gazetoj, kiuj al niaj propagandistoj principe rifuzas la publikigon de priesperantaj artikoloj, tute propravole aperigis noton pri nia jubilea kongreso en Krakovo kaj pri kelkaj aliaj faktoj el Esperantujo? Ankoraŭ pli strange estas, ke la koncerna artikoleto ne devenas el Germanujo, sed estas prenita el la itala gazeto *„Corriere della Sera“*. Ni ricevis pli ol cent germanajn gazetojn, en kiuj la noto aperis, kaj inter ili estas kelkaj, ekz. *Deutsche Zeitung*, Berlin, *Deutsche Reichs-Zeitung*, Bonn, *Kölnische Volkszeitung*, Köln a. Rh., k. a., kiuj sisteme kontraŭbatalas tiel nian lingvon, kiel la tutan demandon pri internacia helplingvo. Kiamaniere tio estas klarigebla?

Jen la solvo de la enigmo. La verkinto de tiuj ĉi linioj havas bonajn interrilatojn kun granda eldonejo de diversaj ĉiutagaj gazetoj en Berlin, kiu ankaŭ eldonas la ĵus cititan gazeton *Deutsche Zeitung*. Ĉiusemajne li vizitas la redakcion de tiu ĉi gazeto, parolas kun la redaktoro pri Esperanto kaj proponas al li priesperantajn artikolojn, kiuj konstante estas rifuzataj. Nun leginte la supre priparolitan noton en *D. Z.*, li senvorte montris ĝin al la redaktoro, kun mirigita, demandanta vizaĝo. Kaj kion la brava ĵurnalisto respondis? „Ho, sinjoro, tio estas alia afero. La noto devenas el nia raportoficejo, kiu liveras al ni la ĝeneralan materialon por nia gazeto. La oficejo prenas sur sin la respondecon pri la senditaj informoj, kaj nia redakcio povas esti certa, ke ili estas ĝustaj. Se vi aŭ aliaj esperantistoj sendas al ni tiajn artikoletojn, ni ne povas esplori, ĉu ili estas ĝustaj kaj ne trograndigitaj. Ni ne volas okupiĝi kaj ankaŭ ne informiĝi pri la Esperanta afero, ĉar ni tion ne povas pro la naciaj celoj de nia gazeto. Pro tio ni nur tute okaze publikigas komuninteresajn notojn, kiujn ni ricevis el absolute fidinda fonto.“

Tiu ĉi respondo estas tipa por la opinio, kiu en la plej multaj redakcioj regas pri nia afero. Sed ĝi montras al ni ankaŭ la vojon, sur kiu oni eble pli bone ol ĝis nun povas atingi la publikigon de priesperantaj notoj kaj traktatoj. La propagandistoj, kiuj atente legis la antaŭajn liniojn, certe scias trovi la celitan vojon, tiel ke ni ne bezonas speciale atentigi pri ĝi. Nur pri unu punkto, kiu nenjam sufiĉe povas esti konsiderata, ni volas insisti: Ĉiu propagandisto, kiu verkas artikolojn por gazetoj aŭ raportoficejoj, zorgu, ke liaj raportoj kaj citaĵoj pri nia movado estu neriproĉeblaj laŭ ĉiu rilato. Pli bone estas, se oni rakontas malmulte da efikaj realaĵoj, ol centojn da fantaziaĵoj, kiuj povas esti kontraŭbatalataj de niaj malamikoj. Nur tiam ni iom post iom gajnos la konfidon de la naciaj gazetoj.

*

„Der Wanderer“, Zürich, Rennweg 33, eldonis apartan represon de la artikolo de Prof. Christaller, pri kiu ni raportis en No. 6 A, p. 91. La redakcio dissendas ĝin laŭ deziro senpage; do la interesuloj havigu al si la folion, kiu ankaŭ enhavas klarigojn pri la ligo „Der Wanderer“ (la migranto).

Pri aperintaj gazetartikoloj ni detale raportos en la proksima numero. *Argus.*

Internationale Esperanto-Bewegung

Die 25-Jahrfeier der ersten Herausgabe der *Lingvo Internacia de Dr. Esperanto* wurde am 2. Juni überall mit gleichem Enthusiasmus begangen und wird auch weiter das ganze Jahr hindurch im Vordergrund stehen. Wir können nicht alle Jubiläumsfeiern im immer grösser werdenden Esperantujo auch nur erwähnen, werden aber in der nächsten Nummer versuchen, die Feiern in den einzelnen Ländern nach Möglichkeit gleichmässig zu berücksichtigen. Heute nur einige Notizen.

Grossartig wurde der Jubiläumstag von den Pariser Esperantisten begangen, die sich hierzu in dem Stadthause des 5. Distrikts in zahlreicher Menge unter dem Vorsitz von Prof. Cart und dem Ehrenvorsitz von S-ro Rollet de l'Isle eingefunden hatten. Das vollständig in Esperanto gehaltene Programm war von der *„Zamenhofa Artista Adeptaro“* vorzüglich zusammengestellt und wurde in glänzender Weise zur Ausführung gebracht.

Weitere Kreise dürfte auch die Feier in Sabadell in Spanien interessieren. Dort hatten sich die Gruppen *del Vallés* vereint, um in einem vor Sabadell gelegenen Walde das Fest gemeinsam zu begehen. Es war eine Freilichtbühne errichtet, auf der von denselben Spielern, wie auf dem 5-a in Barcelona, das Stück *„Mistero de doloro“* aufgeführt wurde. Der Magistrat hatte für die Festlichkeit die Stadtkapelle zur Verfügung gestellt und taufte an diesem Tage eine Strasse mit dem Namen unseres Meisters. Alle Tageszeitungen hatten am Jubiläumstage in ihren Spalten begeisterte Artikel über Esperanto.

„Der 2. Juni 1887 hat durch Esperanto eine weltgeschichtliche Bedeutung bekommen,“ schliesst ein längerer Artikel der *„Neuen Freien Presse“* in Wien, in dem über die Entwicklung der Weltsprachenbewegung und den jetzigen Stand der Esperantobewegung und die Bedeutung dieser Weltsprache ausführlich berichtet wird. Wir können nur unserer Freude darüber Ausdruck geben, eine derartig günstige Besprechung in einem so angesehenen Blatte zu finden.

Zu einer grossen Kundgebung für Esperanto wurde die am 30. März veranstaltete Feier des 25jährigen Jubiläums der wissenschaftlichen und literarischen Tätigkeit des Prof. R. F. Brandt an der Kaiserlichen Universität Moskau, der auch ein eifriger Esperantist ist. Als in der Russischen Bibliographischen Gesellschaft an diesem Abend die Professoren und Gelehrten Moskaus versammelt waren, erhob sich, nachdem zuvor der Dekan der historisch-philologischen Fakultät, der Vorsitzende des orientalischen Seminars, der Vertreter der städtischen Universität Moskau, der Vorsitzende der Kaiserl. Akademie der Wissenschaften, sowie Vertreter der Kaiserl. Gesellschaft für Geschichte, der Moskauer psychologischen Gesellschaft, der Tolstoj-Gesellschaft u. a. den Jubilar beglückwünscht hatten, zuletzt der Vorsitzende der *Moskva Societo Esperantista*, S-ro Korzlinskij, und sprach im Namen der russischen Esperantisten seine Glückwünsche in Esperanto aus. Vor dieser erlesenen Gesellschaft der Wissen-

schaft dankte der Jubilar gleichfalls in fliessendem Esperanto, und die anwesenden Professoren und Akademiker applaudierten und gaben somit ihre Zustimmung zu der in dieser Weise sicher zum erstenmal in die Oeffentlichkeit tretenden Weltsprache Esperanto!

Eine wichtige und erfreuliche Nachricht kommt aus Bulgarien. Dort hat das Ministerium für Volksunterricht das von unserem Freunde J. H. Krestanov verfasste, neue bulgarische Esperanto-Lehrbuch approbiert und es in einem amtlichen Rundschreiben (Nr. 10 083 vom 31. Mai 13. Juni d. J.) allen Direktoren von Gymnasien, Progymnasien und pädagogischen Lehranstalten, sowie den Bezirks-Schulinspektoren empfohlen. — Das ist sicher der erste Schritt zur Einführung des Esperanto in die Schulen Bulgariens. Hoffen wir, dass dies binnen kurzem geschehe!

Eine weitere wichtige Notiz entnehmen wir der *„Frankfurter Zeitung“* vom 5. 6. Danach besteht die Absicht, ein grosses internationales Korrespondenzbureau für katholische Zeitungen aller Länder zu gründen. Das Pressunternehmen, dem hohe geistliche und weltliche Persönlichkeiten ihre Unterstützung angedeihen lassen, wird in allen grösseren Staaten eigene Bureaus und in allen Ländern der Erde Korrespondenten unterhalten. Der Verkehr zwischen den Landesbureaus geschieht in der Hilfssprache Esperanto, von der erst kürzlich der Papst Pius X. an einen Missionar in Canada schrieb, dass Esperanto der katholischen Kirche noch grosse Dienste leisten werde. Der Ankauf bestehender katholischer Korrespondenzbureaus, resp. die Versehung derselben mit esperantokundigen Redakteuren ist vorgesehen. Als Generalleiter des internationalen Pressunternehmens ist der frühere Direktor der J. U. T. A., Herr J. A. Kral, vorgesehen. Sitz des Zentralbureaus wird wegen seiner religiösen und geographischen Lage München werden.

Auch als wissenschaftliche Hilfskraft im kleinen hat sich kürzlich Esperanto wieder einmal bewährt. Durch verschiedene Tageszeitungen ging die schauerlich-schöne Beschreibung der Auferstehung eines Scheintoten. Diesmal war es ein ungarischer Bauer aus Zurowice (Galizien). Dr. Breiger (Berlin) stellte nun mit Hilfe der Delegierten der U. E. A. in Wien und Krakau fest, dass auch diese Geschichte auf Erfindung beruht und dass der besagte Bauer seit Ende April in seinem ewigen Schlaf ungestört geruht hat. So ist es diesmal mit Hilfe von Esperanto gelungen, wie bisher stets bei näherem Nachforschen zu erweisen, dass solche Erzählungen von scheintot Begrabenen nichts als stets wiederkehrende Sommerenten sind. Wissenschaftlich hat bis jetzt ein solches Ereignis noch nie festgestellt werden können.

S-ro W. Conrad, der, wie schon mitgeteilt wurde, eine Fussreise durch Europa unter Benutzung des Esperanto und der U. E. A. macht, ist Anfang Juni in Triest angekommen.

Europa.

Belgien. Die Gruppe in Charleroi erhielt vom Magistrat eine Unterstützung von 200 Fr. mit der Bestimmung, sie unter die fleissigsten Schüler zu verteilen, damit diese dem diesjährigen nationalen Esperantokongress in Gent beiwohnen könnten. Die Gruppe vergrösserte diese Summe und teilte sie in Prämien von je 25 Mark ein. Die Bewerber müssen über 16 Jahre alt sein, sich schriftlich an den Vorsitzenden wenden, müssen fleissig und erfolgreich den Kursus besucht haben und sich endlich einem Examen unterziehen.

Frankreich. In Creil feierte die vor drei Monaten neu gegründete Gruppe ihr erstes Jahresfest, an dem auch der Bürgermeister und der Departements-Abgeordnete teilnahmen. Vorher war ein offizieller Empfang im Stadthaus. — In Châlon s. S. wurde den Soldaten, die sich an einem Esperantokursus beteiligen wollten, für die Kursusabende Urlaub erteilt. — Beim Karnevalzuge beteiligte sich die Esperantogruppe mit einem Festwagen; sie erhielt hierzu von dem Festkomitee eine Beihilfe von 250 Fr. — In Lons-le-Saunier überreichte der Vorsitzende der Gruppe dem Herrn Prof. Payebin eine bronzene Medaille, die ihm auf Antrag des Schulrats vom Minister für öffentlichen Unterricht für seinen vierjährigen Unterricht in Esperanto an der Schule verliehen worden war. — In der *École préparatoire* in Chambéry hielt S-ro Evrot mit Erlaubnis des Rektors eine Serie von Vorträgen mit Lichtbildern über internationale Kongresse. Mitten im ersten Vortrag fing er auf einmal an, Esperanto zu reden, indem er eine lustige Geschichte erzählte, und zwar wusste er die Worte so zu wählen, dass jeder den Sinn verstand. Das machte einen ungeheuer imponierenden Eindruck und wurde auch von *Le Bulletin Syndicat des Institutrices et Instituteurs de la Savoie* in einem längeren Artikel sehr günstig besprochen. — In Romans bei Bourge-du-Péage erzielte Oberstleutnant Pillon ermutigende Resultate. — Neue Gruppen wurden gegründet in Tonnerre mit 65 Mitgliedern, in Corbeilles-Lorcy, Segré und Salon; in letzterer Stadt nach einem Vortrage von Prof. Boel, dem 400 Personen zuhörten.

Grossbritannien. Sehr eifrig propagandierte man im März in Accrington; erfolgreiche Vorträge fanden statt vor der Frauenvereinigung und in der Literarischen Gesellschaft daselbst. — In Birmingham wurde in dem Verein der „Christlichen Jünglinge“ der Sekretär der Kosmopolitischen Gesellschaft für Esperanto gewonnen. — S-ro Privat sprach hier auch in dem französischen Klub der Universität erst in Französisch und dann in Englisch über Esperanto vor mehr als 100 Personen. Berichte über diesen Vortrag fanden sich in allen Tageszeitungen. — In Reigate sprachen S-roj Privat und Mudie; hier wurde der Bürgermeister für Esperanto gewonnen. — In Dorking hielten Vorträge S-roj Marchand, Long und Flügel. — Auch vor dem englischen Kriegsminister, Lord Haldane, konnte S-ro Privat sprechen. Auf seine Anfrage, ob es nicht möglich sei, Esperanto im englischen Heer einzuführen, erklärte der Minister, dass er nichts versprechen könne, da die Engländer überall sehr vorsichtig und konservativ seien. Sonst äusserte sich der Minister sehr interessiert zu hören, wie weit die Sprache schon Verbreitung gefunden habe; besonders war er erstaunt, dass sie auch in China und Japan schon gute Fortschritte mache. Jedenfalls werde er die weitere Entwicklung des Esperanto im Auge behalten. — In der *British Socialist Party* will man eine Resolution zur Abstimmung bringen, dass Esperanto für alle internationalen Verhandlungen dieser Gesellschaft als zu benutzende Sprache zugelassen werde. — In Sheffield in der *„Empire“ Music-Hall* erfreuen sich jetzt des Beifalls der englischen samideanoj die uns Berlinern und auch vielen anderen in- und

ausländischen Esperantisten wohlbekannten Gebrüder Schwarz, die jetzt, wie die *Sheffield Weekly News* erzählt, ihre künstlerischen Produktionen in Englisch, Französisch, Deutsch und Esperanto geben. Das Blatt erzählt bei dieser Gelegenheit auch in seiner Esperantoecke, wie die Gebrüder Schwarz Esperantisten wurden, wie sie die jetzt schon über 800 Mitglieder zählende *Varietea Esperantista Ligo* gründeten usw. (Je tiu ĉi okazo ni sendas nian koregan saluton al niaj karaj fervoraj batalantoj Camilo kaj Karlo Schwarz. La Redakcio.) — In dem „*Royal Irish Constabulary Magazine*" wurde von dem Konstabler P. A. Byrne ein interessanter Artikel „Esperanto and Police Work" veröffentlicht, in dem unter anderem auch über die Verbreitung des Esperanto unter der Polizeitruppe des Kontinentes speziell berichtet wurde. Ein kleines, aber arbeitsames Zentrum dieser Bewegung befindet sich in Dublin (School of languages, Lincoln-place), wo jedem Polizeimann weitere Auskunft gegeben wird. — In der Dubliner Universität sprach S-ro Dro G. Jameson Johnston in der Biologischen und Experimental-Gesellschaft über Esperanto. — S-ro Sergius Winkelmann el Dresden, kiu restis 4 semajnojn en London, kie lin la samideanoj akceptis treege amike kaj gasteme, petis nin diri al ĉiuj gesinjoroj kaj societoj sian tre koran dankon. Ni tre volonte plenumas la peton, ĉar ĝi ree montras la internaciecon de la Esperantismo.

Holland. In der Aprilnummer berichteten auch wir, dass im Haag laut Beschluss des Magistrats mit 19 gegen 15 Stimmen Esperantounterricht in den dortigen Schulen zugelassen sei. Wie wir nun der Mainummer des „*Holanda Pioniro*" entnehmen, beruht diese Nachricht auf einem Irrtum. Der Beschluss lautet nur dahin, einige hundert Mark zu bewilligen, um einen Versuch in selbständigen Esperantokursen mit gleichaltrigen Schülern zu machen. Wir hatten die Notiz dem „*Nederlanda Katoliko*" entnommen und glaubten denselben gut informiert.

Oesterreich-Ungarn. Der 6. Sokol-Kongress bediente sich für seine Propaganda des Esperanto; so legte er z. B. 3200 Flugblätter dem Organ der U. E. A. „*Esperanto*" bei. Auch entnahm man für den Führer, der zu diesem Zweck für die Kongressstadt Prag herausgegeben wird, einige Seiten aus dem dort schon erschienenen Esperantoführer. — Die „*Bohema Unuiĝo Esperantista*" empfing auch in diesem Jahre vom Magistrat eine Beihilfe von 50 Kronen; es ist dies schon die vierte Unterstützung, welche die Gesellschaft vom Magistrat erhielt. — In Kolozsvár in Ungarn befindet sich seit einiger Zeit an einer auffälligen Stelle eines Schaufensters eine ständige Ausstellung von verschiedenen Ansichtspostkarten mit Esperantotext aus allen denkbaren Ländern. Jede Woche werden die Karten ausgetauscht und durch eine Serie neuer Karten ersetzt; jedesmal wird auch ein erklärender Text in Ungarisch unter die Karten gelegt, so dass die Zuschauer auch die Illustration verstehen können. Stets ist das Fenster von Schaulustigen umlagert. In der Tat scheint diese Propaganda, die übrigens schon anderweitig mit eben solchem Erfolge gemacht wurde, so in einer spanischen Stadt, sehr nachahmungswert.

Schweiz. In Neuchâtel fand im März das diesjährige Jahresfest statt, an dem 450 Personen teilnahmen; es wurden Esperanto-Aufführungen veranstaltet, ferner wurde gesungen, und zum Schluss fand der übliche Tanz statt. — Der Februarsitzung des Neuchâteler Esperantovereins wohnte nach langer gezwungener Abwesenheit S-ro Prof. Bonjour wieder einmal bei; er war begleitet von 30 Studenten und Studentinnen der Handelsabteilung der Universität. — Wegen der für Davos erfolgreichen Reklame durch Esperanto und die U. E. A., die durch Herausgabe von Esperantofremdenführer, durch Beteiligung an der Ausstellung in Krefeld, sowie durch Zeitungsartikel gemacht war, hatte der Verkehrsverein von Davos der dortigen Esperanto-Gruppe eine Einladung zur Teilnahme an dem im Februar veranstalteten Winterfest geschickt. Hierzu hatte die Gruppe einen Esperantoschlitten ausgerüstet und mit vielen seidenen Fahnen und Fähnchen geschmückt; Aufschriften in deutscher, französischer und englischer Sprache über Esperanto waren angebracht. Hoch oben befand sich ein Globus, der mit den verschiedenen Landesfarben dekoriert war. Auch die Insassen des Schlittens waren aus den verschiedensten Völkern gebildet, sogar ein Chinese fehlte nicht. Zu beiden Seiten des Schlittens schritten zwei Knaben, eine grüne Schärpe mit der einfachen Aufschrift „Esperanto!" umgab ihre Brust. Sie verteilten während des ganzen Zuges Flugblätter in deutscher und französischer Sprache unter die Tausende von Zuschauern. In allen Tageszeitungen konnte man vor und nach dem Fest oft den Namen Esperanto lesen, zumal der Schlitten auch eine Prämie davontrug. Wie alle Gruppen des Zuges wurde auch der Esperantoschlitten photographiert (das Bild ist für zwei Antwortscheine zu haben bei F-ino Herzog, Davos-Platz, Bahnhofstrasse). — Die Vorträge von S-ro Parrish tragen schon Früchte: in Neuchâtel fand ein Kursus mit 20 Teilnehmern statt, in Winterthur ein solcher mit 30 Hörern, ebenso in St. Gallen nach vorheriger Propaganda durch die Tageszeitungen. — In Le Locle war der Vortrag von Parrish ein geradezu grossartiger Erfolg. Der Zudrang war so gross, dass zwei Vorträge angesetzt werden mussten; zum ersten hatten sich 500 bis 600 erwachsene Personen eingefunden. Auch die dortigen Lehrer hatten unter den Kindern für den Vortrag Interesse zu erregen gewusst. Im Klub selbst herrscht reges Leben, an einem kleinen Abendfest nahmen 54 Klubmitglieder teil. Nach dem jährlichen Abschlussexamen in den Schulen gaben einige Lehrer einzelnen ihrer Schüler Unterricht in Esperanto. — In Bern hat die Gruppe jetzt ungefähr 30 Mitglieder. — In Lausanne finden an jedem Montag Zusammenkünfte der Gruppe statt, und zwar am 1. Montag im Monat im Café des „Hotel de la Paix", am 3. im Café „Old India" und am 2. und 4. in der Handelsschule. Im „*Bund*", „*Baseler Vorwärts*", „*Züricher Freitagszeitung*", „*Zuger Volksblatt*" und im „*Courier de Davos*" erschienen Artikel über Esperanto.

Amerika.

Die Handelsschule „*Worcester Business Institute*" führt von jetzt ab für ihre Schüler Esperanto-Unterricht ein, und zwar einen Kursus für Anfänger, einen für Sprachübungen und einen dritten für Sprache und Lektüre. In der öffentlichen Bibliothek von Worcester befinden sich nicht nur eine Anzahl Esperantobücher, sondern auch der *Amerika Esperantisto* liegt regelmässig auf

dem Lesetische aus. Im Esperanto-Oficejo, Mainstr. 116, kann man alles, was mit Esperanto Beziehung hat, kaufen — In Ithaca beschlossen die Studenten des „*Cosmopolitan Club*", an der „*Cornell-Universität*" eifrig Esperanto zu treiben, damit sie bei dem im September 1913 dort tagenden internationalen Kongress der „*Corda Fratres*" sich mit den auswärtigen Delegierten, die alle schon Esperanto verstehen und benutzen, verständigen können. Der Esperantoklub der Schüler höherer Schulen vergrössert sich von Woche zu Woche. Unter den Schülern der Western-Schule, die dem Esperantoklub angehören, befinden sich die Vorstände der Ballspielabteilung, der Sport- und der Diskutierabteilung; auch der Redakteur der Schulzeitung ist Esperantist. In den übrigen höheren Schulen soll nun in derselben Art propagandiert werden. Auch in West Palm Beach fängt Esperanto an sich zu verbreiten; unterstützt von der Zeitschrift „*Tropikal Sun*", die über Esperanto wiederholt berichtete, gelang es dort, eine Gruppe zu gründen. — In Chicago arrangierte der Klub im März in dem *West Park Club House* eine sehr erfolgreiche Propaganda-Versammlung mit vorzüglichem Programm; als Neuheit sei erwähnt, dass man hier einen neuen Tanz aufführte, dem man den Namen Esperanto-Tanz gegeben hat. Besonders unter den Böhmisch-Amerikanern macht Esperanto grosse Fortschritte; Aerzte, Juristen, Architekten, Ingenieure, überhaupt Wissenschaftler sind zahlreich unter diesen vertreten. — Im Centra Oficejo in Kuba sind jetzt 449 Esperantisten eingeschrieben. Die Zeitung „*El Correo*" veröffentlichte auf ihrer ersten Seite das zweite Zirkular vom 8 Internationalen Esperantokongress. Auch andere Zeitungen, wie „*Blairsville Courier*", „*Pittsburgh Sun*", „*Pittsburgh Chronicle Telegraph*", die Schulzeitung „*Old Hughes*" und „*Free Press*" in Toronto brachten Artikel über Esperanto. Die böhmische Zeitung „*Osveta Americka*" hat regelmässig eine Esperantoecke. Da diese Zeitung eine grosse Verbreitung unter den böhmischen Bewohnern Amerikas hat, so ist dies ein vortreffliches Förderungsmittel zur Verbreitung der Sprache. In der Aprilnummer berichteten wir von dem grossen Erfolg, den Esperanto in Amerika gehabt hat durch die Erwählung der Esperantobezeichnung „*Montamara Festo*" für das am 3. Juli beginnende, acht Tage dauernde Volksfest in Tacoma. Wie wir dem „*Amerika Esperantisto*" entnehmen, werden die weiteren Erfolge für unsere Sache noch ausgedehnter werden. So wird in der Festwoche ein grosser amerikanischer Esperantokongress in Tacoma stattfinden, der voraussichtlich der grösste Esperantokongress sein wird, den Amerika bis jetzt gehabt hat. Für den Kongress stellte die Handelskammer, die, wie wir schon mehrfach berichteten, sich ja auch sonst des Esperanto bedient, in ihrem neuerbauten Hause einen grossen Saal zu allen Zusammenkünften gratis zur Verfügung. Auch das Festkomitee gab 150 Sm. Beihilfe, wofür zur Teilnahme am Festzug ein Festwagen hergestellt werden soll, während alle anderen Vereine nur 100 Sm. hierzu bekamen. Allem Anschein nach wird die Zeit bald kommen, wo Amerika, wenn der praktische Amerikaner einmal den Nutzen des Esperanto erfasst hat, die erste Stelle unter den esperantoverbreitenden Völkern einnimmt. Erst dann wird man auch in Deutschland anfangen, „Esperanto" etwas weniger bürokratisch zu betrachten und zu behandeln. Vielleicht tritt dann auch in nicht zu langer Zeit einmal die Periode ein, wo die scheinbar gewinnbringende und oft nur deswegen schon erschwerte Beschäftigung mit Esperanto einen wirtschaftlichen Profit abwirft. *Dr. A.*

Lingvo Kosmopolita.

Malgaje kaj kun granda bedaŭro mi formetis la unuan kajeron de la nova gazeto „*Lingvo Kosmopolita*", aperanta en Genevo. Kial? Ĉu ne estas bone, ke homoj pripensadas kaj pritraktas de ĉiuj flankoj tiel gravan aferon, kiel sendube estas lingvo internacia? Certe estas bone, sed permesu al mi klarigi la aferon per ekzemplo.

Dum multaj jarcentoj la homoj konsideris la aerflugadon de homo kiel sensencaĵon aŭ fabelon, neniam efektivigotan. Kio en la lastaj jaroj de nia tempo fundamente ŝanĝis la opinion de la tuta mondo? Ĉu tiu ĉi aŭ tiu ornamo de flugmaŝinoj, ĉu tiu ĉi aŭ tiu plibonigaĵo de flugaparato? Tute ne. Konvinkis kaj ŝanĝis la opinion de la tuta homaro ne teĥnikaj plibonigoj, sed la reala, videbla apero de fluganta homo en la aero. Ĉiu, kiu vidis ĉi tiun ne atendite realigitan fenomenon, sendube pensis, ke tiu nova aerveturilo ne estas perfekta, ke oni ĝin plibonigos, sed li tuj konvinkiĝis, ke li havis malĝustan opinion pri la neebleco, realigi tiun „utopion". La plej nekredemaj estis devigataj fariĝi kredemuloj, ĉar ili ne povis nei la fakton kaj nun rapide „kreskas la afero" de la aerveturado, ĉar ĉiu prudenta homo estas konvinkita pri la realigita „utopio" kaj kredas, ke oni povas kaj devas pliperfektigi la „aermaŝinon".

La saman vojon devas iri nia „Esperanto".

La lingvo internacia Esperanto havas jam maŝinon nomatan „Fundamento", kiu facilmaniere kaj lerte scias flugigi niajn pensojn al spiritoj de diverslingvaj homoj. Sed kiom el ĉirkaŭ 1600 milionoj da terloĝantoj volas tion nun kredi? Ĉu estas pli multe ol cent milionoj?

Kaj ni, esperantistoj, anstataŭ konvinkadi la homojn, anstataŭ montri al laŭ eblo plej grandaj popolamasoj la eblecon, la utilon de la eminenta eltrovaĵo, de facillernebla lingvo internacia, ni, ne farinte la plej gravan unuan laboron, jam pripensas pri dua, tria, kvara laboro, kiuj povas havi sencon nur tiam, kiam la unua laboro sukcesos; ni perdas niajn ne tro grandajn fortojn per interbatalado inter ni mem, ni malkonsentas ni pritraktas pri dua- kaj triagradaj flankaj aferoj, dum niaj malamikoj aŭ la indiferentuloj ridete anoncas: ili estas malprudentaj utopiistoj, ili ne scias mem, kion ili volas.

